



中國報道

EL POPOLA

ĈINIO







Xiangshan en aütuno
Foto de Yan Jin



INTER NI

Pri politikaj artikoloj

Homoj en niaj landoj volus scii iom pri la politiko kaj sociaj kondiĉoj en Ĉinio, sed ni komprenas, ke tio ne estas facila. Ili ne multon scias pri la moderna Ĉinio, kaj vi helpas pliklerigi nin. Se iam mi estos riĉa, mi vin vizitos.

W. GREEN (Britio)

Mi ne interesigas pri politiko kaj mi kredas ke la plejmulto de la legantaro estas nepolitikemuloj. Ĝuste tial mi proponas, ke EPC ne eldonu artikolojn pri politikaj aferoj, sed prezentu la ordinaran vivon de ĉinoj kaj la kulturalan atmosferon en via lando.

RANTANEN AIMO (Finnlando)

Mi amas Mao, kiu donis al Ĉinio la plej bonan vivsistemon, mi ŝatus legi ion nekontan pri lia vivo, ankaŭ estas bonvena en la revuo io pri aliaj sindonemaj komunistoj de via lando.

C. P. CASTANHO (Brazilo)

Niaj legantoj loĝas en ĉiuj mondpartoj. Ili vivas en malsamaj landoj kaj havas malsamajn profesiojn kaj interesojn, tial la temoj prezentitaj de ili estas tre diversaj. Ekz. la tri supraj legantoj prezentis malsamajn opiniojn pri politikaj temoj. Ni bonvenigas ĉiajn opiniojn kaj laŭeble kontentigos la malsamajn dezirojn de niaj legantoj, kiam ni verkos artikolojn.

La Red.

ENHAVO

14 Heroa batalo kontraŭ inundo

6 Al Oceano

10 Tekulturo de Ĉinio

40 ANTIKVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:

Drinkema, frenezuma kaj sarkasmema filozofo

30 Virino en paspartuo (Novelo)

44 EL ĈINAJ GAZETOJ

52 Li amas pentri florojn kaj birdojn

27 ARTOJ DE ĈINIO:

Miraklaj farunaj skulptaĵoj

37 Favorigi bruon al la homaro

34 POR VIA SANO:

Gimnastiko sur seĝo

45 Vizito al lando de marmoro

48 LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:

Subtera loĝejo

36 MIRINDAĴOJ DE ĈINIO:

Kortegaj kombiloj

22 Biera festivalo en Qingdao

35 AMUZOJ

43 KURANTAJ AFEROJ

19 Neforgesebla kongreso de Bergen

38 Memore al s-ro Tikos

18 NEFORGESEBLAJ HOMOJ (8):

Nagata Akiko

26 ESP-NOVAĴOJ

42 POR KOMENCANTOJ

4 INTER NI

37 48 KORESPONDI DEZIRAS

2 Xiangshan en aŭtuno

9 Akvofalo

32 Aperos artikolo-serio "Laŭ Antikva Vojo al Tibeto"

54 Brokaĵoj de tuĝa-oj

SUR LA DORSKOVRILO:

[ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Raraj birdoj

SUR LA KOVRILO:


Trinku bovlon da vino!

Foto de XU XIANGJUN

Kiam gastoj venas al mjaŭ-a vilaĝo, la lokanoj proponas al ili bovlon da vino. Tio estas tradicia moro de mjaŭoj.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Jiangsu-provinco (p. 14)
2. Suzhou (p. 14)
3. Wuxi (p. 14)
4. Changzhou (p. 14)
5. Anhui-provinco (p. 14)
6. Hefei (p. 14)
7. Zhejiang-provinco (p. 14)
8. Hangzhou (p. 14)
9. Jiaxing (p. 14)
10. Qingdao (p. 22)
11. Dali (p. 45)
12. Sanmenxia (p. 48)



Al Oceano

de DU YUEJIN kaj WANG JIAN



Haveno Foto de Yan Jin

En kultivejo de laminario Foto de Yan Jin






Bredejo en malprofundaĵo Foto de **Huang Taopeng**



Kolektado de mara kreskaĵo Foto de **Li Shuande**



Surmara esplorado
Foto de **Huang Taopeng**

POR havigi al si pli da riĉfontoj kaj protekti la vivmedion kontraŭ tro granda loĝantaro, pli kaj pli multaj landoj komencis ekspluati oceanon, kaj ankaŭ Ĉinio tion faras.

REVENO AL OCEANO

Oceano iam estis hejmloko de la homaro. Post pli ol 400 milionoj da jaroj, la homaro komencis reveni al oceano.

Ekspluati oceanon fariĝis aktuala bezono por disvolvi la ekonomion, ke ĉiam pli malmultiĝas la surtera riĉfontoj bezonataj de la homaro, dume abundas riĉfontoj en oceano.

En Ĉinio malmultaj estas la kampoj, dume trogranda la loĝantaro. En 2000, se la totala produktokvanto de grenoj de la nunaj pli ol kvarcent milionoj da tunoj en la tuta lando kreskos ĝis kvincent milionoj da tunoj, la tiama poka-pa porcio estos ankoraŭ malfacile grandkvante multigebla. Tial, malfacilo en liverado de grenoj, proteino kaj aliaj manĝaĵoj estos serioza defio al la ĉina nacio.

Ĉinio havas almenaŭ 0.4 milionon da kvadrataj kilometroj da kontinentobreto etendiĝas ĉ. 200 metrojn en la marojn, kiu egalas al 2.2 miliardoj da muoj (15 muoj=1 hektaro) da malprofunda maro, interalie la surfaco de la malprofunda maro kun profundo de 15 metroj kaj strando estas sume 0.21 miliardo da muoj. El tiuj malprofunda akvo oni povos kapti ĉ. kvin milionojn da tunoj da fiŝoj. Laŭ kalkulo de biologoj, la proteino liverata en ĉiuj du muoj da maro egalas al tiu en unu muo da fekunda kampo, t.e. disvolvi agrikulturon kaj fiŝkaptadon sur maro eble estos grava metodo por Ĉinio en solvo de nesufiĉo de manĝaĵoj.

Sur la ĉina kontinento pli kaj pli malmultiĝas la konservata kvanto de riĉfonto de petrolo kaj natura gaso, dum sub la proksimaj maroj la konservata kvanto de petrolo kaj gaso estas 18 miliardoj da tunoj. Sendube oceano fariĝos nova fonto de petrolo kaj natura gaso.

Krome, disvolvi kaj utiligi maran trafikon havas gravan strategian signifon. Statistiko diras, ke la

ĉinaj surmaraj vojoj jam atingis pli ol 600 havenojn de pli ol 150 landoj kaj regionoj ĉe la bordoj de Pacifiko, Hindia Oceano kaj Atlantiko. Se la mara trafiko estos blokita, vartransporto malmultiĝos almenaŭ 100 milionojn da tunoj ĉiujare, kio certe detruos la ekonomion.

OCEANA EKSPLUATO EN ĈINIO

Ĉinio havas tre vastan marareon. La totala areo de Bohai-mar, Flava Maro, Orienta Ĉina Maro kaj Suda Ĉina Maro estas pli ol 4.7 milionoj da kvadrataj kilometroj. La marborda linio de la ĉeftero longas 32 000 kilometrojn, kaj laŭ ĝi kuŝas 6 500 insuloj. Ĉinio havas longan historion en utiligo de maro en fiŝado, salfarado kaj mara trafiko. En la lastaj jaroj, post praktiko de ekonomia reformo kaj pordmalfermo, preni riĉaĵojn el oceano fariĝis komuna opinio de la ĉinaj ekonomikistoj, oni jam praktikis la politikon "ekspluati samtempe kun protekto de la oceano", kio garantiis longtempan disvolviĝon de la oceana afero.

Esploro pri kultivado de algoj por sensaligi marakvon



Nekompleta statistiko informis, ke en 1979 la totala produktovalo de la ĉefaj maraj industrioj de Ĉinio estis 6.4 miliardoj da juanoj kaj en 1989 25.4 miliardoj da juanoj, t.e. ĝi kvaroble kreskis en la dek jaroj. Sume 1 240 ankrejojn havas la ĉefaj havenoj ĉe la ĉina marbordo. La totala tonelaro de la komerca floto okupis la okan lokon en la mondo. La totala produktokvanto de la maraj produktajoj atingis 6.6 milionojn da tunoj, interalie la produktokvanto de salo ĉiam okupis la unuan lokon en la mondo dum multaj jaroj. Speciale rimarkinde estas, ke multaj oceanaj industrioj estas fonditaj, ekz. ĉiujare Ĉinio prenas milionon da tunoj da petrolo de la maroj. Ankaŭ aperis ĝojiga disvolviĝo en ekspluatado kaj utiligo de oceana regenera fuelo, ekz. utiligo de tajdo en produkto de elektro, sensaligo de marakvo por mildigi la problemon de manko de dolĉa akvo, bredado kaj plantado ĉe marbordo, industria prilaborado, turismo, oceana kemio k.a.

Tamen, kompare kun multaj marbordaj landoj, ankoraŭ malal-

taj restas la skalo kaj nivelo de la ĉina oceana ekspluatado. En la mondo oni ĉiujare prenas 700 milionojn da tunoj da petrolo kaj gaso de la maroj, kiuj konsistigas 1/4 de la totala kvanto de produktita petrolo, dume la ekspluatado de submara petrolo kaj gaso en Ĉinio estas en komenca periodo, kaj ĝia jara produktokvanto estas nur ĉ. miliono da tunoj da petrolo.

PERSPEKTIVO DE OCEANA EKSPLUATO EN ĈINIO

Aŭtoritatulo informis, ke baldaŭ aperos politiko kaj programo pri oceana ekspluatado en la naŭdekaj jaroj. La programo montros la disvolvan planon de la ĉinaj maroj en la naŭdekaj jaroj:

Unuece planizi por racie ekspluati kaj utiligi la marbordajn riĉfontojn. Ĉe la ĉina marbordo ne nur estas strandoj, virga tero kaj havenoj, sed ankaŭ abundas sablo, maraj fueloj kaj turismaj lokoj. Plene ekspluati tiujn riĉfontojn ludos grandan rolon por disvolvi la ekonomion de la marbordaj regionoj kaj tiun de la tuta lando.

Ekspluati kaj konstrui la insulojn laŭ kondiĉoj kaj specoj de la insuloj en kelkaj periodoj. La totala areo de la ĉinaj insuloj estas okdek miloj da kvadrataj kilometroj. En la naŭdekaj jaroj oni ĉefe disvolvos fiŝkaptadon kaj bredadon sur la 200 insuloj de la administra nivelo de subgubernio. Samtempe oni disvolvos sur tiuj insuloj aliajn industriojn, ekz. prilaboradon de marestaĵoj kaj turismon. Iuj insuloj, havantaj necesajn kondiĉojn, estos laŭplane malfermitaj al aliaj landoj.

Sinteze ekspluati kaj ordigi Bohai-maron, ĉefajn golfojn kaj riverbuŝojn, profundigi la fundamentajn laborojn de la kontinentobreto kaj la specifaj ekonomiaj regionoj, kaj plifortigi ekspluatadon kaj administradon.

Daŭre esplori la oceanajn riĉfontojn kaj fari sciencan esploron en Antarkto por serĉi la rezervan riĉfonton, esplori kaj ekspluati la riĉfonton de estaĵoj en oceano, turni la ĉefan laboron en Antarkto de konstruo de stacio al scienca esplorado.

Akcenti laboron pri la sistemo de oceana observado kaj prevento kaj forigo de ĉiaj katastrofoj por malmultigi oceanajn katastrofojn, pli bone plenumi la koncernan leĝon por protekti la oceanan medion, disvolvi oceanajn sciencojn kaj teknikojn kaj oceanologian edukadon aferon por levi la povon de esplorado, ekspluatado kaj protekto de oceano, por ke nia ĝenerala nivelo de oceanaj sciencoj kaj teknikoj estu avangarda en la mondo.

Koncernaj fakuloj proponis, ke pro financa malfacilo nia lando devas disvolvi la oceanan ekspluatadon per turno de sciencoj kaj teknikoj en produktan povon. En la sesdekaj jaroj, profesoro Zeng Chengkui, ĉina fakulo pri mara algo, akiris sukceson en esplorado de teknikoj pri laminaria kulturo, kio donis ĉiujare ducent milojn da tunoj da laminario kaj portis al la ŝtato gigantan profiton. Ankoraŭ inspira estas lia ekzemplo por nia nuna oceana ekspluatado. ■

Ĉemara salejo



Tekulturo de Ĉinio



Belaj teservicoj

Statuo de tea majstro Lu Yu




Teksto de CAO WEI

Fotoj de CAI HAIFENG



Amiandano acetas cinajn teservicojn en la Tekultura Festivalo.



Tebovloj kun kovriloj

Prezentado de la plej antikva teceremonio de Tiantaishan, Ĉinio



POST streĉa laboro regali siajn amikojn per kruĉo da bona teo kaj babili pri ĉio — kia agrabla vivo post laboro! Teo, kiel refreŝiga trinkaĵo, donas ne nur sensan plezuron, sed ankaŭ bonan influon al la psiko de ĉinoj, tial ĝi estas parto de la ĉina civilizacio.

LA HISTORIO DE TEO

Fine de 1988, 14 tefakuloj de Taiwan-provinco alvenis Menghai-gubernion de Yunnan, malgraŭ longa vojaĝo. En tiea praarbaro ili trovis sovaĝan 1 700-jaran tearbon kun alto de 14.7 m kaj perimetro de 2.9 m. Ili ekstaziĝis, opiniante, ke ili trovis la plej maljunan tearbon de la mondo, kaj fotis sin kune kun ĝi. Oni diris, ke la tearbo kun la nomo "Reĝo de la Tearboj" atestas, ke Ĉinio estas la hejmlando de teo.

La ĉina teo havas historion de 4 000-5 000 jaroj. Cirkulas legendo de la antikva Ĉinio, ke la reĝo Shennong senvenenigis per teo. En la periodo de la Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a. K.) jam aperis primitiva teofarado — sekigi teofoliojn en la suno; en Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) oni komencis kulturi tearbojn; kaj en Tang- kaj Song-dinastioj (618-1279) teo fariĝis unu el la ĉefaj agrikulturaj plantoj.

Post miljara kulturado oni faris antaŭe sovaĝajn arbofoliojn multaj specoj de teo. Laŭ malsamaj preparmetodoj la ĉina teo estas klasifikita en verda, bruna, wulong-a (speco de duonfermentinta teo), jasmena kaj aglomerita specoj. Ne mankas al ili fajnaj specoj, kiaj freŝkolora kaj bonodora Longjing-teo produktata ĉe la Okcidenta Lago de Hangzhou, aroma Biluochun-teo produktata ĉe Biluo-montpinto; kaj Tieguanyin-teo, kies verdaj folioj estas galonitaj per ruĝa rando.

TEKULTURO

De 4 000 jaroj ĉinoj havas la kutimon trinki teon, tamen tekulturo aperis en Wei- kaj Jindinastioj (220-420) kaj prosperis

en Tang- kaj Song-dinastioj. Tiam furoris parado per riĉeco. Nature, satmanĝinte, nobeluloj volis trinki teon por mildigi suferadon de troa satigo. Kaj tiamaj famaj intelektuloj emis al sensenca babilado kaj ĥimero. Por tiuj, kiuj ne ŝatis drinki aŭ ne havis monon, teo estis la plej bona trinkaĵo.

En la periodo, kiam regis imperiestro Xuanzong (685-762) de Tang-dinastio, en Longgai-templo de Tianmen, Hubei-provinco, servis juna bonzo Jir, kiu poste famiĝis kiel tea majstro Lu Yu. Vivante monotonan kaj regulan vivon en la templo, li bone sciis la efikojn de teo. Fari zenisman lecionon postulas absorbitan meditadon kaj senmovan sidadon. Teo estas trinkaĵo nemandigebla por bonzoj, ĉar ĝi konvenas al la malpermesoj de budhismo, krome ĝi havas refreŝigan kaj soifo-kvietigan efikojn. Oni diris, ke tiam bonzoj trinkis ĉiutage almenaŭ po 40-50 bovlojn da teo. Ĝuste en tia medio Lu Yu fariĝis tetrinkema kaj lin kaptis la ideo verki libron pri teo. Kaj tiel aperis la plej frua verko pri teo en Ĉinio — "Libro de Teo".

Por tetrinkemulo estas nemandigeblaj kvar elementoj, t.e. bona teo, bonkvalita akvo, infuzarto kaj teservico. Sen unu el ili oni ne sukcesos prepari teon en ĝia plena senco. Por ekzemplo mi citas pecon el la fama klasika verko "Songo en Ruĝa Buduaro" de Qing-dinastio (1616-1911). Ĝi legiĝas jene: "Monahino Miaoyu regalias gastojn per teo, kiun ŝi infuzis per neĝakvo kolektita de sur petaloj de ume-floroj en vintro kaj konservita en vazo plurajn jarojn. La teo havas neesprimeblan bonodoron kaj puran guston." El tio videblas, kiom gravas bonkvalita akvo, fajna teo kaj taŭga infuzo en preparo de bona te-trinkaĵo.

Bonodora te-trinkaĵo devas esti metata en altklasan teservicon. Ĝenerale teservicoj estas faritaj el argilo, arĝento, kupro, kristalo, agato, vitro k.a. Plejofte uzigas en Ĉinio teservicoj el porcelano kaj purpura argilo. La teo sur neĝblanka fono de taso el porcelano povas

plene montri sian belan koloron; la teservico el purpura argilo, kvankam ĝi ne povas bone montri la koloron de la teo, povas longtempe teni la teon neputra. Kia plezuro, kiam vi ĝuas la ĉarman pejzaĝon, trinkante fajnan teon!

Nun, pro okupateco oni ne havas sufiĉe da libertempo por tion ĝui. Oni trinkas teon nur por kvietigi soifon kaj sin refreŝigi. Tion faras precipe ordinara laboristoj kaj oficistoj. Precipe la lastaj laboras ĉiam kun tetaso ĉe si, kio estas en modo.

Krom trinki teon en tetrinkejo, kiu similas al eŭropa kafejo, ĉinoj regalias gastojn ankaŭ per teo hejme. Se vi gastas ĉe via amiko, li certe prezentas al vi tason da teo por bonvenigi vin, ne konsiderante, ĉu vi soifas aŭ ne. Ne gravas, ĉu vi trinkas aŭ ne. Estas maldece, ke la mastro ne prezentas teon al gasto.

De la pasintaj jaroj ordinaraĵoj ĉinoj ankaŭ ĝuas kafon kaj kokolon, kiel eŭropanoj. Kiel granda lando de teoproduktado, ĉiujare Ĉinio eksportas teon po-grande. Dank' al ekonomia kaj kultura interŝanĝo, printempe ĉi-jare, en Longjing-distrikto ĉe la Okcidenta Lago de Hangzhou kunvenis pli ol 800 tefakuloj. En la kunveno ĉinaj kaj alilandaj tefakuloj ĝuis belan prezenton de tearto, faritan de delegitoj el diversaj partoj de Ĉinio, kaj konis la spiriton strebi al harmonio de la ĉina tearto. La aktivado akcelis la disvastiĝon de la nuna ĉina tekulturo. Ĝi estas soleno de la ĉina kultura rondo en 1991.

DISVASTIĜO DE TEKULTURO

Post kiam teo aperis kiel trinkaĵo, ĝi disvastiĝis de suda Ĉinio al la norda, kaj pli poste, eksterlanden dank' al la disvastiĝo de la ĉina kulturo.

La plej frua noto pri teo estis farita en la periodo, kiam regis imperiestro Wudi (156-87 a. K.) de Han-dinastio. Tiam iuj senditoj de la imperio portis teon al sudorienta

Azio. En la 5-a jarcento teo estis eksportita laŭ la Silka Vojo en Iranon kaj Hindion. En la periodo de Tang-dinastio, japanoj, rusoj, britoj kaj nederlandanoj ne nur importis la ĉinan teon, sed ankaŭ komencis kulturi kaj prilabori teon. Kun la disvastiĝo de tekulturo te-moro furoris en orientaj kaj okcidentaj landoj. En la 18-a jarcento, iniciatite de la kortego, aperis en Britio la ceremonioj — te-horo kaj te-akcepto. Kompreneble, en la historio de la tea disvastiĝo Japanio portas pli da romane-cakoloro.

Parolante pri Japanio, oni ne povas ne menciigi teaceremonion. Simpla dekoracio, solena atmosfero kaj bonodora, iom maldolĉgusta teo forgesigas ĉagrenon en la vivo. La teaceremonio kun la koloro de budhismo estas disvolviginta de la te-rito de Tang-dinastio.

En Zhejiang de Ĉinio kuŝas la fama budhisma monto Tiantai. Tie estas la budhisma sanktejo de Tiantai-sekto kaj ankaŭ produktoj de la fama teo Huadingyunwu. En 804 japana eminenta bonzo Saicho venis tien por plenumi religiajn lecionojn. La kunvivado kun ĉinaj bonzoj havigis al li la kutimon trinki teon. Multajn jarojn poste, li revenis sian patrolandon kun du objektoj: zenismo kaj teaj semoj.

Post du jarcentoj alia japana bonzo Eisai forlasis la lokon kaj revenis la patrolandon kun libroj de budhismaj sutroj kaj teaj semoj. Poste li skribis "Teo kaj Sano", la plej fruan verkon en Japanio pri teo. Kun la kresko de la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Japanio te-akcepto, riĉa je ĉina stilo kaj zenismo, disvastigis sian influon en Japanio kaj el tio evoluis teaceremonio plena de japana temperamento.

Retrospektive rigardante kelkmiljaran historion de teo, oni povas vidi, ke la milda fajna teo, kvankam ne forta kiel brando, alportas al la ĉina popolo mildecon kaj sobrecon kaj al la mondo pacon kaj kvieton. ■



Daj-a knabino en infuzo de teo

La peranto de EL POPOLA ĈINIO en Venezuelo
 Prof. David G. Valecillos V.
 Calle 79 No 3c-72
 MARACAIBO-4002. VENEZUELO
 ankaŭ povas ricevi abonkotizojn al nia revuo de
 aliaj latinamerikaj landoj.
 BONVENON al novaj abonantoj!


Heroa batalo kontraŭ inundo

SOMERE de 1991, eksterordinare granda inundo atakis orientan Ĉinion. De la lasta tagdeko de majo pluvego senĉese verŝigis en orientan Ĉinion. La akvo

en Taihu-lago ĉe la limo inter la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang superis la rekordan nivelon en la historio kaj Taihu-lago fariĝis danĝera. La inundo rompis digojn en pli ol 30 lokoj kaj superakvis 2


milionojn da hektaroj da kampoj. Akvo eniris en 1.2 milionojn da loĝdomoj kaj 20 000 fabrikoj devis ĉesigi sian produktadon. La inundo minacis la urbojn Ŝanhajo, Hangzhou, Suzhou, Wuxi, Chang-

Armeanoj kaj popolanoj kune batalas kontraŭ la inundo.



Kampoj inunditaj

Remeto de trako



de DA WEI

zhou kaj Jiaxing.

Portante amasegon da sablo, la inundo freneze sin ĵetis kontraŭ la grandan digon de Huaihe-rivero 400 km longan en la provinco Anhui. Estis minacataj la grandaj di-





Xinghua en inundo



Por transloĝigi suferantojn de la inundo

Por kreskigi plantojn post la inundo





Translokiĝo al sekura loko



Kuracistoj ekzamenas la korpon de knabo.

goj de la riveroj Huaihe kaj Yangzi. Danĝero aperis ankaŭ en la 5 grandaj akvokonservejoj, inkl. tiun de Foziling. La inundo atakis 38 guberniojn kaj urbojn kaj englutis 24 300 vilaĝojn. En Hefei, la ĉefurbo de Anhui-provinco, la akvo estis 1.5 m profunda.

HEROAJ BATALO KONTRAŬ LA INUNDO

La popolo de la provincoj Anhui kaj Jianguo leviĝis por batali kontraŭ la furioza inundo. Ili plifirmigis digojn kaj forfluigis akvon. Kaj per tio ili enskribis novan paĝon en la historion de la batalo de la ĉina popolo kontraŭ katastrofo.

Sur la 290 km longa digo ĉirkaŭ Taihu-lago vidiĝis miloj kaj dek miloj da digoprotektantoj. Protekti la digon estis ilia komuna volo. Sur la ŝtona digo ĉiuj protektantoj formis firman defendlinion.

La gvidantoj de Jintan-gubernio, Jianguo-provinco, organizis 1 200 kontraŭinundajn sturmajn taĉmentojn. Kiam pli ol 100 000 loĝantoj estis sieĝataj de la inundo, la sturmaj taĉmentoj veturigis ilin en sekurajn lokojn per

kaŭĉukaj boatoj, motorboatoj, cementoboatoj, lignaj kuvoj, feraj siteloj k.a.

En 50 tagoj Jianguo-provinco sukcese aranĝis urĝan translokiĝon de 4 milionoj da loĝantoj el pli ol 18 000 vilaĝoj kaj kvartaloj.

La urboj Suzhou kaj Wuxi, kiuj situas ĉe Taihu-lago, senrezerve plenumis la ordonon de la Ŝtata Kontraŭinunda Komando kaj eksplode breĉis 2 akvobaraĵojn, kio multe rapidigis la elfluon de la superakvo el Taihu-lago.

Kiam la inundo furioze alproksimiĝis al la antikva urbo Suzhou, urba gvidanto diris kategorie: "La klasikaj ĝardenoj neniel detruigu!" Ĉe la danĝeraj lokoj ili konstruis 5 firmajn baraĵojn, kiuj sukcese defendis la antikvan urbon kontraŭ la inundo.

En Anhui-provinco, ĉe la kriza momento, kiam la furioza inundo, transirinte la 50 km longan digon de Sanjie-rivero en Liu'anlu, torentis al kampoj kaj vilaĝoj, rapide venis tien grupo da junuloj. Ili senprokraste sin ĵetis en la torenton, fiksas palisojn en ĝi kaj konstruis firman baraĵon el tersakoj.

Neniu en la inunditaj lokoj forgesos: kie aperis danĝero, tie batalis komandantoj kaj soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj Armita Polico.

La 6-an de julio, enfalis taluso en pluraj lokoj de la suda parto de la Tianjin-Pukou-a Fervojo, sudnorda trafika arterio de Ĉinio, kaj la fervojo ĉesis funkcii. Centmiloj da pasaĝeroj restis en Nankino, Wuxi, Ŝanhajo kaj aliaj gravaj stacidomoj. 2 400 oficiroj kaj soldatoj de la Nankina Trupo rapide sin direktis al la lokoj. Ili, atakate de pluvego, batalis 3 tagnoktojn kontraŭ la akvo, dank' al tio denove ekfunkciis la fervojo, kiu estis paralizita antaŭ 52 horoj.

Laŭ nekompleta statistiko, ĝis la mezo de julio la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj Armita Polico sendis 800 000 homojn kaj 30 000 veturilojn al la inunditaj lokoj, savis 300 000 homojn kaj eldanĝerigis 200 000 tunojn da materialoj.

Oni neniel forgesos la bravulojn, kiuj oferis sian vivon en la batalo kontraŭ la inundo. Distrikta oficisto Li Dehong de Jianguo-provinco laboris 10 sinsekvajn tag-

noktojn sur digo, falis en akvon pro lacego kaj ne elakvigis. Ministro Sun Yong de Huainan-karbominejo de Anhui sin ĵetis en torenton trifoje por stopi breĉon per sakoj kaj heroe viktimitis. Zhou Liping, plotonestro de la Nankina Trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, oferis sian vivon por eldanĝerigi materialojn de la popolo.

ĈINIO VENKOS LA KATASTROFON

Antaŭe en la basenoj de la riveroj Yangzi kaj Huaihe okazis 2 grandegaj inundoj. La inundo de Yangzi-rivero en 1954 forrabis la vivon de 30 000 homoj kaj la inundo en 1931 perdis la vivon de 150 000 homoj, sed ĉi-foje mortis nur 2 078 homoj en la superakvo. En la ĵurnalo "Overseas" de Nov-Jorko, Usono, oni diris: "Estas ja miraklo, ke pro la tiel serioza inundo mortis malmultaj homoj en la vastega inundita areo. Kvankam en la inunditaj lokoj la loĝantoj estas mizeraj, tamen ili estas en bona animstato. Tie ne vidiĝas almozpetantoj nek malsatuloj nek serioza epidemio."

Gu Jinkui, 72-jara kamparano en Duotian-distrikto de Xinghua, Jiangsu-provinco, postvivis la 3 inundojn. Li diris: "La ĉi-foja inundo estas la plej granda, sed mi estas tre trankvila, ĉar la registaro garantias nian vivon."

Estas la kapablo de Ĉinio por batali kontraŭ la inundo, kio trankviligis lin.

Unue, la ĉina registaro metis la sekurecon de la homa vivo sur la unuan lokon. Ĝi faris ĉion eblan por transloki la loĝantojn en sekurajn lokojn ĝustatempe kaj bonorde, tiel ke la mortokvanto malpliĝis.

Due, la inundo ne kaŭzis breĉon al grandaj digoj de ĉefaj riveroj, nek englutis urbegojn, kaj tion oni devas ŝuldi al grandaj akvomastromaj konstruaĵoj starigitaj de la ŝtato en la lastaj jaroj.

S-ro Yang Zhenhuai, ministro de akvoutiligo de Ĉinio, konigis al

mi, ke ĉi-foje en la inundo pli ol 20 grandaj kaj mezgrandaj akvokonservejoj ĉe la supra baseno de Huaihe-rivero kiel la unua defendlinio retenis 3.8 miliardojn da kubmetroj da akvo kaj per tio mildigis la seriozecon de la inundo en la malsupra baseno. Malsupre laŭ Huaihe-rivero estas 200 km longa loko kun lagoj kaj marĉejoj, kiu funkcias kiel la dua defendlinio. Sen akvokonservejoj kaj lagoj la flukvanto de la trunko de Huaihe-rivero superus 10 000 kubmetrojn sekunde. Se tiel, estus do malfacile defendi la grandan digon de Huaihe-rivero kaj danĝero falus sur la tieajn fervojojn, karbominejojn kaj termoelektrajn.

Laŭ statistiko, en la 40 jaroj post kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko la centra kaj lokaj registaroj investis sume 200 miliardojn da juanoj por starigi kaj ripari akvomastromajn konstruaĵojn. Nun en la tuta lando oni konstruis 83 000 akvokonservejojn, digojn kun totala longo de 226 000 km kaj 27 600 kluzojn.

Trie, en nia lando jam formiĝis kompleta kontraŭinunda komand-sistemo, kiu havas la kapablon kunarangi la kontraŭinundan laboron.

Forlasi parton kaj konservi la tuton estas bonefika rimedo por la batalo kontraŭ la inundo. Fakuloj de la Ŝtata Kontraŭinunda Komando diris, ke ĉi-foje laŭ plano la ŝtato utiligis 17 kompare malaltajn lokojn por konservi akvon kaj lasis superakvitaj ĉ. 100 000 hektarojn da kampoj, sur kiuj loĝis 0.81 miliono da loĝantoj, dank' al kio la ŝtato sukcese konservis la digon de norda bordo de Huaihe-rivero kaj la tieajn fervojojn, protektis 10 milionojn da loĝantoj kaj milionon da hektaroj da kampoj.

En Jiangsu. Anhui kaj Ŝanhajo oni eksplode rompis plurajn digojn por ellasi akvon. Por tio la tieaj popolanoj faris grandan oferon kaj montris noblan spiriton, ke la intereso de la ŝtato estas pli gravaj ol la iliaj. Antaŭvespere de la eksplodo multaj loĝantoj sendormis, ĉe ili kuris ondo da zorgo kaj mal-

trankvilo. Iu kamparano kun larmoj sidis la tutan nokton ĉe la bordo de la cisterno, kiun ŝi prizorgis laŭ respondeca kontrakto kaj kie ŝi bredis fiŝojn. Ĉe la tagiĝo ŝi forviŝis la larmojn kaj iris kun laboriloj por defendi digon kaj batali kontraŭ la inundo.

HELPO EL ĈIUJ FLANKOJ

"Helpon al mizeruloj el ĉiuj flankoj" estas diro cirkulanta en Ĉinio dum miloj da jaroj. Ĝi estas bela priskribo pri la helpo far eksterlandaj rondo kaj individuoj al la popolanoj en la inunditaj lokoj.

Iu elementlernejo sendis siajn ŝparitajn 10.37 juanojn al la inundita Anhui-provinco. Iu pli-ol-80-jara maljunulino donacis sian pension de 500 juanoj, akumulitan en pluraj jaroj. Post donaco de mono iu handikapulo diris: "Ĉiu ĉino havas la respondecon pri sia ŝtato."

Institucioj, societoj, fabrikoj, minejoj, entreprenoj, armeoj kaj milionoj da popolanoj de la ŝtato helpis la inunditajn lokojn. Artistoj faris beneficon kaj pentristoj oferis siajn altvalorajn pentraĵojn. En mallonga tempo formiĝis la landskala tajdo de la helpo al la inunditaj regionoj.

Samtempe kun tio, Hongkongaj, Aomen-aj kaj Taiwan-aj loĝantoj kaj transmaraj ĉinoj donacis monon al la loĝantoj atakitaj de la katastrofo. En mallonga tempo Hongkongo donacis 600 milionojn da Hongkongaj dolaroj.

Krome, ankaŭ registaroj kaj societoj de la Ruĝa Kruco de dekoj da landoj kaj regionoj donis al Ĉinio humanisman helpon pere de UN.

Estas menciinde, ke nia redakcio ricevis tian mondonacon de nia brita leganto s-ro Rowe William.

Nun, kiam mi finis tiun ĉi artikolon, en la regionoj, kiujn atakis la inundo, la akvonivelo de la riveroj kaj lagoj komencis malleviĝi. Multaj fabrikoj denove ekfunkciis kaj la tieaj popolanoj komencis ree konstrui sian hejmlokon. ■

Nagata Akiko


de CHEN YUAN

EN universitato de Vankuvero mi renkontis s-inon Nagata kaj ŝian nederlandan edzon Woessink. Mi demandis ŝin: “Ĉu vi ne memoras min?” “Kial ne? Ĉu vi ankoraŭ memoras vian diron, ke Radio Pekino estas en tre malproksima antaŭurbo? Sed fakte ĝi situas proksime al nia hotelo!” ŝi ridis. “Proksimo kaj malproksimo estas relativaj. Tiam malproksima kaj nun proksima,” ankaŭ mi ridis. Ŝi demandis plu: “Ĉu vi ankoraŭ lavas bovlojn kaj telerojn?” “Same kiel antaŭe,” mi diris. Kaj ŝi ridis serene.

Tio, kion mi rakontis, okazis en la unua duono de 1976, ĉe la fino de la dekjara kultura revolucio. Tamen tiam oni ankoraŭ estis singardema. Ni invitis ilin viziti nian landon — tiam ŝia edzo estis estrarano de UEA. Nia intertraktado celis pluan kontakton inter la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj UEA kaj estis preludo por membriĝo de ĈEL al UEA. Ni loĝigis ilin en la Pekina Hotelo. Ili deziris viziti Radion Pekino — en tiu tempo tio estis nebla. Nur post 10 jaroj, dum la 71-a UK en Pekino, ili sukcesis gastigi ĉe Radio Pekino.

La interparolado pri lavado de bovloj kaj teleroj okazis en la aŭto, kiam mi kaj Tan Xiuzhu (nun vicĉefredaktorino de EPC) akompanis ilin al la flughaveno. En ĉeesto de sia edzo, Nagata demandis min: “Ĉu vi faras hejmlaboron?” Mi respondis, ke mi ne scipovas prepari manĝaĵon, sed lavas bolvojn kaj telerojn, kaj tion mi faris jam kelkdek jarojn. Ŝi starigis al Tan Xiuzhu la saman demandon kaj ricevis respondon, ke ankaŭ ŝia edzo prenis sur sin parton da hejmlaboroj. Nagata riproĉis sian edzon: “Vidu, ili ĉiuj faras hejmlaborojn, sed vi, granda viro, mallaborema!” Eĉ post kelkaj jaroj en Vankuvero ŝi ankoraŭ memoris la interparoladon.

Nagata iam laboris en la Centra Oficejo de UEA — eble pro tio ŝi edziniĝis al nederlandano, kaj ili fariĝis famaj esperantistoj-geedzoj de malsamaj nacioj. Ŝi estis aktiva esperantistino, redaktis la periodaĵon “UN kaj Ni” kaj kunligis Esperanton kun la afero de UN. En la Internacia Socilingvistika Simpozio okazigita en 1986 en Tokio ŝi faris malkaŝeman paroladon i.a. pri tio, ke oni ne devas krei



S-ino Nagata Akiko (meze) kaj ĉinaj esperantistoj

Esperantan vorton kaj konstrui Esperantan frazon nur laŭ la kutimo de la okcidentaj lingvoj. Se oni vere deziras fari Esperanton pli “internacia”, oni devas konsideri la kutimon de la orientaj lingvoj. Ŝi prezentis proponojn, sed bedaŭrinde mi ne trovis ilin en simpoziaj notoj eldonitaj poste. Laŭ mia memoro, iuj el ŝiaj proponoj estas akcepteblaj kaj aliaj ne. Ĉar Esperanto estas bazita sur modernaj lingvoj de Eŭropo kaj ĝia strukturo jam difinita, tial oni povas ensorbi en Esperanton nur iom da vortoj de la orientaj lingvoj kaj fakte tion faris. En la simpozio mi lastafoje kunsidis kun la geedzoj kaj ankaŭ lastafoje renkontiĝis kun Nagata. Post 1986 mi ne partoprenis UK. Kvankam mi kelkfoje vizitis Eŭropon, tamen mi ne vidis ŝin, ĉar ne estis renkontiĝo de esperantistoj. Mi ne plu aŭdos sinsekvon da ŝiaj malkaŝemaj demandoj, kio malĝojigas min. Mi vane esperis, ke ŝi partoprenos la 5-an Pacifikan Kongreson de Esperanto okazontan en 1992 en Qingdao kaj ludos gravan rolon. ■

POR ĉeesti la 76-an UK, ni dek personoj, ses el Pekino kaj kvar el Qingdao, ekflugis de Pekino je la 26-a de julio kaj atingis la kongresurbon Bergeno je la 27-a posttagmeze. Bergeno estas bela antikva kultura havenurbo. Ĉiujare ĝi altiras al si multegon da turistoj per unikaj naturaj pejzaĝoj de Nordio kaj ĉi-somere kiel gastiganto akceptis esperantistojn el diversaj partoj de la mondo, kompreneble, venintajn ne sole pro ĝiaj pitoreskaj pejzaĝoj.

Antaŭ la ekveturo la bulteno, ankaŭ bonkoraj ĉinoj atentigis nin: Kunportu pluvombreton! Tiuvespere vere pluvis kaj nin alblovis agraba frosteto. Malgraŭ tio ni iris al la interkona vespero. Iu lokano humure diris: "Norvegio jare havas nur dek serenajn tagojn." Tamen nin akompanis poste kelkaj belegaj tagoj, kiujn alportis, oni diris, esperantistoj kune kun amikeco kaj frateco.

FORTA KOHERECO

Antaŭtagmeze de la 28-a de julio solene inaŭguriĝis la 76-a Universala Kongreso de Esperanto en Zemenhof-salono plena je gaja kaj festa etoso. Ĝin ĉeestis ĉ. 2 000 esperantistoj el 55 landoj. S-ro John Wells, prezidanto de UEA, faris varman inaŭgurparoladon, substrekte, ke Esperanto estas la sola justa solvo al la monda lingvoproblemo, kiu estus urĝa kaj grava demando malgraŭ la fakto, ke multaj neinformitoj ankoraŭ ne konsciiĝis pri tio. Post la reprezentanto de la alta protektanto de la kongreso kaj la vicurbestro de Bergeno sekvis kiel kutime salutvortoj de reprezentantoj de ambasadoj en Norvegio kaj landaj asocioj. Ankaŭ s-ro Liu Ling, la aganta ĝenerala sekretario de ĈEL, donis salutvortojn kaj bonvenigis kongresanojn al la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao. Kun entuziasmo kaj aplaŭdo finiĝis la inaŭguro kaj komenciĝis la enhaviĉa programo — komitata kunveno, diskutado pri la kongresa temo, fakaj kaj aliaj agadoj, nacia

Neforgesebla kongreso de Bergeno

— Pri la 76-a UK de Esperanto

Teksto de NUO WEN

Fotoj de EPC-raportistoj



Kunsido de EPC-legantoj

kaj internacia vesperoj, teatra kaj muzika prezentoj, asociaj aktivadoj ktp. La semajna kongreso havigis al ĉiu partoprenanto la bonan ŝancon komuniki amikan senton kaj ekzerci sin en uzado de Esper-

anto en diversaj kampoj. Iu amiko, kiu unuafoje ĉeestis la kongreson, kortuŝite diris: "Mi propre spertas la solidarecon kaj harmonion de esperantistoj, kaj vidas ilian fortan koherecon kunforĝitan per Esper-



S-ro Liu Zhen prezentas la preparan laboron por la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto.

anto.”

BONVENON AL QINGDAO

Post la 4-a PKE de 1988 en Aŭstralio okazos la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao, de la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto 1992. Por ĉerpi sperton el UK kaj sukcese irigi la preparlaboron, venis al Bergeno kvar sinjoroj el Qingdao, kun Liu Zhen ĉekape, vicprezidanto de ĈEL kaj honora prezidanto de la Qingdao-a Esperanto-Ligo.

Unue, ili akceptis vizitantojn ĉe la ĝiĉeto de la Pacifika Kongreso. Multaj amikoj tie petis la unuan bultenon, aliĝilon kaj bezonatajn informojn.

Due, okazis la kunveno “Sin prezentas la Pacifika Kongreso” posttagmeze de la 30-a de julio en Privat-salono. S-ro Liu Zhen koniĝis al la ĉeestantoj la urbon Qingdao, ĝian E-movadon kaj kondiĉojn por sukcesigi la kongreson. Qingdao estas grava ĉemara urbo en orienta Ĉinio, iom simila al Bergeno. Ĝi povos liveri al partoprenantoj abundajn manĝaĵojn multe malpli kostajn ol en Bergeno. En la urbo estas mil homoj, kiuj lernas kaj uzas Esperanton. Krome, tie estas ankaŭ kristana kaj islama preĝejoj kaj budhisma kaj taoisma temploj. Post li, s-ro Dai Song'en raportis pri la planitaj aranĝoj. Krom kutima programo estos kurso de ĉina kuirarto, demonstro de la ĉina medicino, masaĝo kaj akupunkturo, oratora konkurso, aŭkcio ktp. La demandojn pri loĝado, manĝado, turismo kaj prezoj s-ro

Liu Mingkui respondis unu post alia.

Trie, ili kontaktiĝis kun la respondeculoj de E-asocioj de pluraj landoj kaj interkonsiliĝis kun tiuj pri organizado de vizitgrupoj kaj karavanoj al la kongreso. Kelkaj amikoj jam donis jesan respondon.

Pri la detalaj aranĝoj la dua bulteno kaj EPĈ raportos al vi poste.

AZIA MOVADO EN EVOLUADO

Kio plej profunde impresis nin en la kongreso? La leviĝo de azia movado! Ĉijare, ekster nia atendo, el Nepalo, Malajzio, Singapuro kaj Taiwan de Ĉinio venis kongresanoj, kies reprezentantoj ne nur donis salutvortojn ĉe la inaŭguro, sed ankaŭ kunsidis trifoje kun aliaj asociaj delegitoj sub prezido de s-ro So Gilsu por diskuti kunlaboron kaj antaŭenpuŝon de la azia movado. En la lastaj jaroj iom post iom evoluis E-movado en la supre menciitaj landoj kaj regiono, kaj revigliĝis en Vjetnamio, Indonezio kaj Tajlando. Tio multe ŝuldiĝas al klopodoj de s-roj Joachim Werdin kaj Ulrich Lins kaj fraŭlino Sabira Ståblberg. Kiel aziaj esperantistoj ni volas fari klopodojn kune kun aliaj sindonemaj gesinjoroj por antaŭenigi la azian Esperantan aferon kaj efektiviĝi la projektojn de s-ro So Gilsu.

KUNSIDIS EPĈ-LEGANTOJ

Je la unua renkontiĝo en la kongreso, ni ofte aŭdis: “Mi estas le-

ganto de EPĈ.” “Mi estas multjara abonanto de EPĈ.” Tiuj vortoj tuj mallongigis nian distancon kaj intimigis nin unu alian.

Kiel kutime, posttagmeze de la 1-a de aŭgusto kunsidis ĉ. 200 EPĈ-legantoj en Privat-salono. La kunsido ne nur helpis nin en plibonigo de EPĈ, sed ankaŭ reciprokigis amikan senton unu al la alia. Post la salutaj kaj enkondukaj vortoj de s-ro Zou Guoxiang leviĝis voĉoj de legantoj. Pro la spacolimiĝo ni povis nur resumi iliajn opiniojn kaj proponojn jene:

1. EPĈ devas elekti bonajn temojn, ne nur pri turismo, sed ankaŭ pri ĉinaj propraĵoj, kaj aperiĝi artikolojn pri Esperantaj poŝtaj stampoj kaj vegetarismo.

2. Estos konsiderinde presi jenajn vortojn sur la kovrilo: “Monata revuo en Esperanto”. Tio multe helpos konigi la belan gazeton EPĈ kaj Esperanton al neesperantistoj.

3. La revuo dediĉu pli da spaco por internacia E-movado.

4. Ekde nun la redakcio donu pli da informoj pri la Pacifika Kongreso en Qingdao, kiuj utilos al kono de la kongreso.

Kvankam al ĉi kunsido mankis kritikoj, tamen tiuj valoraj opinioj kaj proponoj estos diskutataj kaj efektivigataj ĉe la redakcio.

Je la 10-a horo de la 3-a de aŭgusto fermiĝis la kongreso per komuna kantado de “La Espero”, kun abundaj fruktoj, pluraj premioj kaj du kongresaj rezolucioj. ■



Ĉinaj esperantistoj en la fermo



Balo

Aziaj esperantistoj en la kunsido pri azia agado



Biera festivalo en Qingdao

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de LING YOUJUAN

EN la 23-a de junio 1991, sur stratoj de Qingdao, ĉemara urbo de Ĉinio, regis gaja atmosfero. Frumatene, oni iris sur stratojn por propraokule spekti la imponan paradon de ĉaroj de la Unua Internacia Biera Festivalo en Qingdao. Ankaŭ mi enviciĝis inter la homaj fluoj.

Invitinte bierajn entreprenistojn el Usono, Germanio, Japanio, Kanado, Singapuro kaj Hongkongo kaj reprezentantojn de 41 ĉinaj biero-fabrikoj, la festivalo prezentis pli ol 100 specojn da bonkvalitaj bieroj ĉinaj kaj alilandaj. Dank' al tiuj biero-fabrikoj, la festivalo estis spicita de impona parado de la ĉaroj.

Je la 9-a matene, gvidate de motorcikloj, transpasis malrapide la podion antaŭ la enirejo de Zhongshan-parko, la festivala emblemo konsistanta el tritikaj spikoj, terglobo kaj biertaso, la festivala bonaŭguro malgranda del-feno alte tenanta biertason plenan de ŝaŭmanta biero kaj la festivala flago akompanata de 6 fraŭlinoj kun ruĝa rubando sur ŝultro, kaj post ili defiladis la buntaj ĉaroj. La plej okulfrapa estis tiu de la Qingdao-a Biero-fabriko. Sur altaj brunaj ĉevaloj du rajdistoj en nigra vesto paradis antaŭe kaj tuj post ili koĉero nigre vestita kondukis antikvecan kaleŝon. Tio signifas, ke biero havas longan histo-

rion. Malantaŭ tio paradis giganta drako, portanta 10 grandajn barelojn. Ĝi reliefigis la celon de la festivalo — preni bieron kiel la avanon por akceli la disvolvigon de ekonomio, komerco, turismo, sciencoj, tekniko kaj sporto.

Sur la bunta ĉaro de la Ĝenerala Biera Kompanio de Jinan, ĉefurbo de Shandong-provinco, oblikve kuŝis giganta botelo, el kiu senĉese verŝiĝis biero en grandan tason. Sur la ĉaro okulfrape vidiĝis famaj fabrikmarkoj “Baotuquan” kaj

“Arkta Oceano”, kiuj montris la ekonomiajn fortojn de la biero-fabrikoj de Jinan.

La ĉaro de la Laoshan-a Biero-fabriko estis varme bonvenigata de la rigardantoj. Sur ĝi la fortaj viroj energie tamburis kaj la spektantoj varme aplaŭdis.

Post kiam pasis la buntaj ĉaroj, gvidanto de la Qingdao-a Registaro malfermis la unuan bierobarelon kaj deklaris la festivalon komencita. Oni bonorde eniris en la bieran

Konkurso de rapida trinkado de biero



urbon en Zhongshan-parko. En la biera urbo mi dronis en nova, agrabla kaj gaja atmosfero. La pordego formiĝis el 4 senĉese ŝprucantaj bierokolonoj, kaj supre bierobarelo kun longo de 5 m kaj diametro de 3 m. En ĝia mezo vidiĝis la festiva-la emblemo kaj ambaŭflanke desegnoj: "El drakbuŝo elŝprucas fonta akvo" kaj "Fenikso tenas tritikan spikon per la beko", kiuj signifas la esencon de biero: akvon kaj grenon.

En la biera urbo kun areo de 90 000 kvadrataj metroj staris 31 bierodomoj, kiuj en verda fono plejparte estas ruĝaj, blankaj kaj bluaj. Ĉiu domo montris la trajtojn de sia fabriko.

La Laoshan-a Biero-fabriko reaperigis ĉarman pejzaĝon de la monto Laoshan en la biera urbo. Post ĝia domo verdas monto kaj torentas akvofalo. La delikata kiosko oportunas por drinki kaj ĝui la belan pejzaĝon.

La formo de la bierodomo de la Laizhou-a Biero-fabriko de la Yantai-a regiono similas al birdego kun etenditaj flugiloj. Post ĝi brilas senĉese turniĝanta reflektaj globego kun diametro de 11 m. Ĝi estis konstruita el sennombraj reflektaj speguloj. Ĝi montras, ke la Laizhou-a Biero-fabriko leviĝas

kiel nova stelo.

La bierodomo de la Qingdao-a Biero-fabriko estas la plej pompa en la urbo. Antaŭ la bierodomo sidis bierobarelo kun diametro de 1.8 m kaj alteco de 3 m kaj oni akceptis la vizitantojn en antikva maniero. Ĉirkaŭ la barelo vidiĝis multaj vizitantoj.

La Qingdao-a biero fama en-kaj eksterlande aperis en 1903. En la pasintaj 88 jaroj ĝi estis ĉiam ŝatata de ĉinoj kaj alilandanoj. Dank' al siaj aparta gusto kaj bona kvalito, ĝi plurfoje gajnis oran medalon en Ĉinio kaj trifoje akiris ĉampionecon en la Internacia Bierotaksa Kunveno de Usono.

La biera urbo altiris al si multajn alilandanojn. Iu kalifornia turisma grupo el 20 personoj, organizita de la Qingdao-a Turisma Branĉo sub la Ĉina Junulara Turisma Servo, venis en Qingdao por partopreni la festivalon. S-ro Tomas, estro de la grupo, naskiĝinta en Jining, Shandong-provinco, ja vizitis Qingdao kune kun siaj gepatroj en sia juneco. En 1979, li refoje venis en Qingdao por dusemajna lekcio. Informiĝinte pri la festivalo, li senprokraste veturis de Hongkongo al Qingdao. Li diris: "Disiĝinte de Qingdao antaŭ pli ol

10 jaroj, mi trovis, ke nun ĝi estas tre pura, ĝia ekonomia kaj kultura konstruado multe progresis. La hodiaŭa festivalo multe interesis min, ĉar estas la unua fojo por mi vidi tiel vivoplenan kaj pompan spektaklon."

S-ro Georg Zentgraf, direktoro de iu bierolernejo de Munkeno, hejmloko de biera festivalo, venis en Qingdao por partopreni en la 2-a Ĉina kaj Germana Biero- kaj Trinkajo-Seminario. Li diris al mi: "Mi estas ĝoja kunlabori kun la Qingdao-a Biero-fabriko kaj havis la feliĉon ĝui multajn specojn da bieroj en la festivalo."

Vere, la biera urbo en la festivalo estis mondo de biero. Tie funkciis bierotaksa ĉambro, kie oni povas gustumi mondfamajn bierojn.


Dum la festivalo pli ol 2 000 alilandanoj venis en Qingdao. Ili ne nur partoprenis la festivalon, sed ankaŭ kontaktiĝis kun iuj departementoj de Shandong, Henan, Shaanxi kaj Qingdao kaj subskribis ekonomiajn, teknikajn kaj komercajn kontraktojn kaj interkonsentojn.

En la biera urbo, plej spektakla estis la bierotrinka konkursejo. Antaŭ la komenciĝo tien ja venis multaj konkursantoj. Kiam oni elmetis la konkursan tabulon, ili konkure sin anoncis por partopreni la konkurson. Tie tre interesa estis la konkurso pri rapideco de trinkado, en ĉiufoja konkurso 6 konkursantoj devis trinki po 3 glasojn da biero (= 1.5 boteloj). La gajninto estis premiita.

La juĝanto informis min: "En la unua tago de la festivalo, nian konkurson partoprenis 500 homoj, el ili multaj estis alilandanoj. La ĉampiono estis viro de Qingdao. Li finis la trinkadon en 12 sekundoj."

La 8-taga festivalo finiĝis. Pere de diversaj aktivadoj la urbo Qingdao elmontris al en-kaj eksterlandanoj sian fizionomion, kaj la tieaj popoloj konatiĝis kun multaj alilandanoj. ■

Alilandanoj en la Biera Festivalo





Kia granda botelo

Prezentado de popola arto en la inaŭguro de la Biera Festivalo




Ĝuo de Qingdao-biero





Biero el la unua barelo

La biera urbo en nokto



ESP-NOVAĴOJ

● Celebre la 70-jaran jubileon de la Komunista Partio de Ĉinio, la 1-an de julio 1991 la Poŝta kaj Telekomunika Buroo de Changshu, Jiangersu-provinco, uzis memorstampilon en la ĉina lingvo kaj Esperanto. Ĝia projektinto estis s-ro Zhang Linrui.

● La 4-an de julio 1991 la junulara sekcio de la Ŝanhaja E-Asocio okazigis kunsidon por festi la 70-jaran jubileon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj finon de la 2-a Deviga E-kurso. La Ŝanhaja E-Asocio donis diplomon al 30 kursanoj en la kunsido.

● La 12-an de julio 1991, la Dandong-a E-Asocio de Liaoning-provinco okazigis jarkunvenon, kiun ĉeestis pli ol 120 esperantistoj.

● En la 14-a de julio 1991, la Dongguan-a E-Asocio de Guangdong-provinco okazigis kunvenon por memorigi la 104-jaran jubileon de la Unua Libro de Esperanto kaj soleni komencon de la 2-a Koresponda Elementa E-kurso, kiun ĉeestis 40 homoj.

● La Pekina E-Asocio, redakcio de "El Popola Ĉinio", Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, Ĉina E-Eldonejo, E-sekcio de Radio Pekino kaj aliaj du societoj kune okazigos de la 9-a ĝis la 15-a de majo 1992 la 1-an Internacian Simpozion pri Aplikado de Esperanto, Pekino.

● Por faciligi al la esperantistoj-filatelistoj kolekton de filatelaĵoj,

S-ro Baikuntha M. Maskey (maldekstre) kaj meksikaj esperantistinoj (la dua kaj la tria de dekstre) gastas en EPC-redakcio.



julie de 1991 la Changshu-a E-Societo de Jiangersu-provinco eldonis la unuan "Ĉinan Katalogon de Memoraj Stampoj en Esperanto" kun 208 Esperantaj memoraj stampoj kun notoj, t.e. ĉiuj Esperantaj stampoj ekde 1959, kiam ĉina poŝtoficejo emisiis memorstampojn en Esperanto.

La katalogo estis kompilita kaj projektita de s-ro Zhang Linrui, membro de la E-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj kaj honora konsilanto de la Ĉina E-Ligo.

● La 18-an de junio 1991, la Ĉina E-Ligo akceptis sian unuan esperantistan gaston el Nepalo, s-ron Baikuntha M. Maskey, kameraiston de televido. Li venis en Pekinon pro siaj fakaj laboroj. Li speciale vizitis la Ĉinan E-Ligon kaj la redakcion de "El Popola Ĉinio". La gasto kaj gastigantoj ĝoje interparolis pri la E-movado de Ĉinio kaj Nepalo, esprimante la deziron plue kontakti en la estonteco.

● En la 17-a de junio 1991, la 16-membra delegacio de la Meksikia-Ĉina Amikeca Asocio kun esperantistino Leonora Torres kiel la ĉefo atingis Ĉinion. Kaj en



La ĉina-Esperanta stampo por La 70 Jaroj de la Fondiĝo de ĈKP

la sekvanta tago s-ino Torres kaj ŝia tuta grupo vizitis la Ĉinan E-Ligon kaj la redakcion de "El Popola Ĉinio". Ili estis intime akceptitaj.

● La 19-an de majo 1991 kunfandiĝis Esperanto-Asocio en Kulturligo (GDREA) kun Germana Esperanto-Asocio en la 69-a Germana Esperanto-Kongreso en Munkeno. La pli ampleksa GEA ne nur pligrandigis sian estraron per tri aktivuloj de eks-GDREA, sed ankaŭ akceptis orientgermanajn fakajn kaj movadajn spertojn kaj subtenis la tiean alistrukturigon necesan pro la sociaj ŝanĝiĝoj.

Krome la 6-an de aprilo 1991 en Berlino fondiĝis Gesellschaft für Interlinguistik (GIL; Societo por Interlingvistiko), kiu celas daŭrigi la interlingvistikan agadon de GDREA kaj ties bonajn kontaktojn kun germanaj lingvistaj rondoj. Ĝia prezidanto estas d-ro Detlev Blanke.

● Antaŭ nelonge fondiĝis la Schia Esperanto-Klubo de Vicenza-provinco, Italio. Post la unua E-kurso, dum la fondkunveno, estis elektitaj prezidanto kaj konsilantaro de la klubo kaj akceptitaj 25 geesperantistoj kiel la unuaj membroj de la klubo.

La membroj de la Schio Esperanto-Klubo de Italio



Miraklaj farunaj skulptaĵoj

Fotoj de LI CHUNGENG



Liu Yinru

LA 1-an de decembro 1988, Kennedy-universitato de Usono okazigis ekspozicion de farunaj skulptaĵoj por la ĉina skulptistino Liu Yinru. La plej granda verko altis dekelke da centimetroj, kaj la plej malgranda — nur kelke da centimetroj. La vizitantoj senescepte admiris la talenton de s-ino Liu, la kreinto de tiuj skulptaĵoj.

Liu Yinru devenas de artista familio. Ŝia patrino ŝatas pentradon, kaj ŝia patro estas kolektanto de popolaj metiartaĵoj. En tiu familio ŝi interesigas pri la ĉinaj popolaj artoj. Ŝi lernis farunan skulptadon ĉe majstro Cao. Dank' al la naturdotita saĝo kaj senĉesa penado, ŝi rapide ekposedis la stilon de majstro Cao kaj disvolvis miniaturan farunskulptadon.


La materialo por skulptado estas faruno. Unue oni devas bone vaporumi kneditan farunon kaj miksi ĝin kun fenolo, glicerino kaj mielo, por ke ĝi ne putru kaj krevu. Oni devas miksi ĝin ankaŭ kun farboj. Ĝenerale, oni uzas 12 kolorojn, sed Liu Yinru uzas multe pli da koloroj en skulptado. Krome, ŝi uzas ankaŭ farbojn por afiŝoj kaj olepentraĵoj, tial ŝiaj verkoj estas pli freŝkoloraj.

La verkoj de Liu Yinru estas tre diversaj. Ŝi


skulptis imperiestrojn, korteganojn, kamparaninojn, paŝtistetojn, feojn, diablojn k.a. La mienoj de antikvaj homoj skulptitaj de ŝi estas vivoveraj. Ŝia verko sub la titolo "En Profunda Nokto" konsistas el grupo da kortegaj kantistinoj kaj dancistinoj dormantaj surtere. Ili kuŝas en diversaj pozoj, kun mienoj tre naturaj. La rigardantoj sentas, ke la senliberaj junulinaj, kontraŭvole ŝajnigantaj sin gajaj, retrovis sian memon nur en profunda nokto.

Liu Yinru verkas tre serioze. Ŝi longe pensadis pri ĉiu figuro antaŭ verkado. Ŝiaj farunaj homoj estas versimilaj ne nur en aspekto, sed ankaŭ en spirito. La figuro de Song Qingling, la edzino de d-ro Sun Yatsen, pioniro de la ĉina moderna revolucio, en neĝblanka vesto, vekas plenan respekton kaj karmemoron de la rigardantoj. La figuroj de afrika junulino kaj hinda dancistino karakteriziĝas per ekzota gusto.

Faruna skulptado estas unu el la tradiciaj popolaj artoj de Ĉinio. Antaŭe oni ofte vidis en urboj metiistojn ofertantaj siajn farunajn metiartaĵojn. Ĉiufoje, kiam ili faris skulptaĵojn, ĉirkaŭ ili kolektiĝis interesatoj junaj kaj maljunaj. Kompare kun tiuj metiistoj, Liu Yinru atingis perfektecon en sia tekniko. ■




Bodisatvo



Antikva dancistino

Spiritoforiganto Zhongkui kaj lia fratino





Militisto



Longevivulo

En profunda nokto



Virino en paspartuo

(Novelo)

de QIU SHANSHAN

EN la unua semajfino post mia transloĝigo en novan apartamenton, mi gastigis miajn amikojn en mia nova loĝejo. Unu el ili estis Fangfuceo, mia kunlernanto en universitato. Ĉirkaŭrigardinte per preskaŭ fermitaj okuloj mian ĉambron, li diris montrante la muron kontraŭ la kanapo en la gastoĉambro: "Tie ĉi devas esti du pentraĵoj."

"Kiaj pentraĵoj? Mi preferus rezervi la lokon por viaj majstraĵoj." Mi scias, ke li ŝatas fotografadon kaj kelkaj el liaj verkoj estas tre bonaj. Kaj mia edzino aldonis: "Mi plej ŝatas viajn pejzaĝajn fotojn."

Fang ridetis: "Bone, se vi afable taksas miajn fotografiaĵojn. Mi promesas donaci al vi du-tri fotojn." Ĉe tio li fiksas sian rigardon sur la muro.

Mi ne estis hejme, kiam Fang venis kun tri fotoj en paspartuo. Mia edzino akceptis lin.

La unua estis pejzaĝa. Li estis lerta en fotado de pejzaĝoj. La foto montris junan arbon en sovaĝa kampo, kiu staras spitante neĝan ŝtormon. La ĉielo estis plumba, la neĝo blanka, la arbo nigra. La dua estas de konstruaĵo. Lastatempe li forte interesiĝis pri fotado de konstruaĵoj. En la foto alta domo ĉirkaŭita de skafaldo, speciale traktite en malluma ĉambro, aspektis kiel la litero A. La lasta estis foto de virino. Tute nuda, ŝi staris antaŭ fenestro. Bantuko kovris la antaŭan parton de ŝia korpo. Ĉar ŝi estis fotita kontraŭ lume, kaj cetere ŝi tenis la kapon iom klinita, ŝia vizaĝo estis malk-

lara. Ŝia pendanta hararo kaj la linioj de la korpo fariĝis la fokuso de la tuta foto.

Mia edzino miris. Ŝi ofte aŭdis de mi, kiel timida estis Fang antaŭ virino, ke li estis eĉ virinofobia, tial li restis virgulo, malgraŭ ke li jam aĝis pli ol 30 jarojn.

Estis nekonvene demandi plu, kaj mia edzino senĉese diris admiron por la fotoj, dum Fang, senĉese dankante ŝian komplimenton, helpis ŝin pendigi la paspartuojn sur la muro.

La nigra-blankaj fotoj en nigraj paspartuoj harmonie lokiĝis sur la muro, vivigante la palan muron.

Fang ekzamenis sian aranĝon kaj foriris kun kontenta rideto.

Tion rakontis al mi la edzino post mia reveno.

Kiam ŝi rakontis, mi atente rigardis la titolojn sub la fotoj. Ili estis "Arbo en neĝo", "Transformiĝo de A" kaj "Virino en paspartuo".

Kiam mia edzino trovis, ke mia rigardo fiksiĝis sur foto de virino, ŝi sin forturnis kun malkontento.

Mi diris laŭte: "Bone, tre bone. Li ja estas vera fotisto, ke tre ordinaraj objektoj fariĝis artismaj en liaj fotoj. Estas bedaŭrinde, ke li ne studis en arta instituto."

La edzino nenion komentariis pri mia parolo kaj iris en kuirejon kunportante manĝilaron.

Mia rigardo refoje falis sur la virinon en la foto. Mi ne sciis, pro kio ŝi vekis ĉe mi malagrablon. De kiam Fang interesiĝis pri virino, kaj ŝtele?

Mi demetis la okulvitrojn kaj

rigardis la foton pli proksime por pli klare vidi la vizaĝon de la virino. Sed nur la nazpinto estis videbla. Laŭ la nazpinto oni povis konkludi, ke la glabelo estas alta.

Mi pririgardis la korpon.

La korpo de tiu virino estis belega, vera artaĵo. La delikata ebura brako nature pendis malsupren, la mano firme tenis bantukon, kio montris ŝian hontemon. Sub la gracia talio elstaris la plena ronda postaĵo. La longaj gamboj enfandiĝis en la nigro malsupre. La brusto estis nevidebla, sed kredeble tie estis bela vidaĵo.

Mia edzino estis multe malpli bela ol ŝi. Ankaŭ la virinoj, kiujn mi konis pli frue ol mian edzinon, ne povis superi ŝin. Ĉe tio ĵaluzo leviĝis kontraŭ Fang. Li longe silentis, kaj trafis belulinon tuj en la unua atako. Tiele mi motivis mian ĵaluzon.

Mi aŭdis paŝbruon de mia edzino. Mi direktis min al ŝi surmetante la okulvitrojn: "Vi jam finis laboron en kuirejo?"

Sed ŝi kriis al la fileto: "Iru lavi vian vizaĝon!"

Mi kaj Fang estis samklasanoj en universitato kaj loĝis en sama ĉambro. Ni bone sciis unu la alian. Ni estis intimaj kaj harmoniaj escepte en sinteno kontraŭ virinoj. Li resumis, ke dum la kvarjara studado en la universitato mi faris nur du aferojn: verki poemojn kaj enamigi. Li diris ĝuste.

Dume li kondutis tute male. Li ĉiam hastadis inter la loĝejo, biblioteko kaj manĝejo, fosadis en materialoj por sia "Studo pri klasikaj noveloj de Ming- kaj Qing-

dinastioj". Li ne fumis, nek drinkis, kaj estis diskreta en rilato kun virinoj, tial la samklasanoj nomis lin Fangfuceo. (-fuceo estas nomo respekta ĝenerale por eruditoj seriozaj, malŝercemaj kaj pedantaj; sed ĉi tie la nomo Fangfuceo estas iom ironia.)

Ĉe diplomigo, la frukto de mia studenta vivo estis fianĉigo al studentino de fremdlingva fakultato, mia nuna edzino. Kaj tiu de Fangfuceo estis du disertacioj publikigitaj en akademiaj gazetoj. Per la honorario de la verkoj li aĉetis malkaran fotilon kaj komencis fotadon.

Ni enviis unu la alian, sed ne intencis imiti reciproke.

Kompreneble multe ŝanĝiĝis niaj karakteroj. La kialo estis tre simpla, ke mi estis postenigita en redakcio de serioza gazeto de serioza institucio, kies ĉefredaktoro estis tiel serioza, ke li ne ridis tiklate. Dum Fang fariĝis raportisto de iu tre influa ĵurnalo. Li diris, ke en lia kabineto, kontraŭ li, sidas tre kapabla kaj ĉarma raportistino. Sendube sur lin efikis nerimarkita influo. Mi sentis ĉagreniĝon pro ĵaluzo, ke Fangfuceo, ĉiam glacia al virinoj, fariĝis galanta.

Mi estis kaptita de la foto.

Ne erotika mi estis. Min konfuzis la demando: Kiu estas tiu belulino? Kiel ŝi estis konkerita de Fangfuceo?

Ĉiutage, kiam mi havis liberan tempon, mia rigardo vagadis sur la foto, sed nenion mi trovis. Mi ne volis agnoski mian malsukceson. Mi demetis la okulvitrojn kaj rigardis de proksime, aŭ faris abruptan ekrigardon al ĝi.

Fine mia edzino ofendiĝis kaj protestis: "Eĉ virinon en foto vi avidas?"

Kaj mi rebatis ŝian mokon: "Eĉ kontraŭ virino en foto vi ĵaluzas?"

Iun tagon, je abrupta ekrigardo mi subite rekonis en ŝi konatinon.

Studante en la dua klaso, mi enamiĝis en studentinon de belarta fakultato. Sed ŝi eĉ rigardeton ne jetis al mi kaj ekamis mian kompa-

non Fangfuceo. Konsidere la amikecon inter mi kaj Fang, mi cedis al li. Sed fine ŝi retiriĝis de li pro lia apatio.

Jes, certe estis ŝi! Nur ŝi havis tiel belan korpon. Mi povis imagi, kial ili rekuniĝis: ŝi ne povis forgesi la amon en la pasinta tempo, dum li ne povis rezisti la tenton de ŝia beleco.

En kontento pro la kompreno mi tamen sentis ĵaluzon. Mi ne povis kompreni, kial ŝi rifuzis tiun, kiu amis ŝin, sed enamiĝis en tiun, kiu estis apatia al ŝi.

Mi bezonis ateston. Se tiu ĉi virino vere estis ŝi, mi neniel povis toleri Fang paradi antaŭ mi.

Kiam Fang eniris, mi estis apre-canta la aliajn du fotojn. Perdiĝis mia scivolo, kiam mi jam sciis, kiu estis tiu virino en la foto.

"Kiel? Ĉu vi estas kontenta pri ĝi?"

"Kiu ŝi estas?" mi demandis rekte.

"Ĉu vi ne rekonis?"

Mi sidiĝis en kanapo kaj diris kun plena memfido: "Sendube mi jam rekonis ŝin. Sed mi bezonas vian konfesion."

"Neniom gravas mia konfeso," apatie diris Fang.

"Mi konfesas, ke mi ne povis konkeri ŝin."

"Kion vi volas sugesti?"

"Mi ne volas klare eldiri," mi ruze ridetis kaj atendis ŝanĝiĝon de lia mieno.

Fang ekridis post momenta hezito.

Silento signifas konfesion. Mi ĝoje diris al li, kiel mi rekonis ŝin en la foto. Mi diris konklude: "Ŝia plej fascina ĉarmo estas la gracia talio, tre ĉarma."

Subite Fang eksplodis de ridego, kio konfuzis min.

"Vi ŝajnigas vin ĉasta, sed fakte vi estas voluptavida," diris Fang post ridego.

"Ne turnu la paroltemon. Ĉu tiu estas ŝi?"

"Ne. Ĉu ŝi ne estas diino por vi? Krome post diplomigo mi neniam

vidis ŝin." Fang diris kun tristeto.

Mi demandis plue: "Ĉu tiu estas la raportistino en via kabineto?"

"Ne, mi ne kuraĝas foti ŝin."

"Ĉu tiu estas via intervjuito?"

"Ne divenu. Ŝi ne ekzistas."

"Sed kiel mi klarigu al miaj amikoj?"

Fang levis la kapon, rigardis la foton kelkan tempon kaj diris al mi kun plezuro: "Vi povas diri, ke ŝi estas mia amatino."

Mi ĝojiĝis, ke Fangfuceo enamiĝis.

"Kiel vi opinias pri ŝi? Ĉu vi ekkonis ŝin? Kiam vi edziĝos?"

Nenion li respondis kaj fine diris en malvigleco: "Ŝi ne ekzistas."

Mi miris. Ĉu la virino ne ŝatas lin? Aŭ li havas psikan obstaklon?

Mi ne sciis, kiel mi povus helpi lin.

De tiam mi ne cerbumis plu pri la foto. Ĝi refariĝis artaĵo.

Iun tagon mia fileto ludis pilkon en la gastoĉambro. La pilko frapiĝis kontraŭ la muron kun la tri paspartuoj kaj unu el ili rompiĝis.

Kiam mi aŭdis la bruon kaj levis la kapon, mi vidis, ke la fileto estas timeme rigardanta min. Frakasigis la paspartuo kun la foto de virino. La foto elfalis el post la frakasita vitro kaj leĝere falis teren.

Kiam mi levis la foton kaj estis insultonta la fileton, mi mutiĝis de miro.

Ĉu tio estas foto? Ĝi estis nur eltondaĵo el fremdlanda bildgazeto. La papero estis bonkvalita, la presarto elstara. Oni malfacile povus malkovri la veron, se li ne vidus la dorsflankon de la papero.

Klariĝis la afero. Evidente jam ĉe la komenco mi eniris en labirinton.

Kial mi eraris? Mi ne multe konsideris.

Mi intencis tuj iri aĉeti vitron kaj remeti la "virinon" en la paspartuon. Kompreneble mi enmetis ne sole la "virinon".

Aperos artikolo-serio “Laŭ Antikva Vojo al Tibeto”


Antaŭ 1 300 jaroj Tang-dinastio (618-907) troviĝis en prospera periodo, kaj ĝia ĉefurbo estis Chang'an (nun Xi'an de Shaanxi-provinco). Sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo okcidente de Tang-imperio estis regno de Tubo, kaj ĝia ĉefurbo estis Luosuo (nun Lhasa de la Tibeta Aŭtonoma Regiono). La du urboj distancas unu de la alia milojn da kilometroj. Delegitoj de la kortegoj kaj komercistoj de la du lokoj frekventis sin reciproke kaj

elhakis la vojon inter Chang'an kaj Luosuo. La vojo estas simbolo de unuiĝo kaj amikeco de la du frataj nacioj en la antikveco. Laŭ tiu vojo princino Wencheng de Tang-dinastio vojaĝis al Lhasa por edziniĝi al la regnestro de Tubo. Pri tio estas multaj interesaj rakontoj.

Post longtempa preparado ni aperigos ekde la unua numero de 1992 artikolo-serion “Laŭ Antikva Vojo al Tibeto”. Ni intencas disponi en ĉiu



Sur stepo kovrita de neĝo



Vilaĝo ĉe la antikva vojo



Fotoj de ZHENG YUNFENG

numero 5 paĝojn por la teksto kaj bildoj. Ni konigos en du jaroj al niaj legantoj la antikvajn kulturajn restaĵojn ĉe la vojo, la naciajn morojn, la popolan vivon, la religiojn, templojn, belajn montojn, riverojn, stepojn, lagojn, neĝajn pejzaĝojn de la altebenaĵo... Niaj legantoj vidos tute freŝajn bildojn de la nova fizionomio ĉe la vojo. Ni esperas, ke nia klopodo trovos ŝaton de niaj karaj legantoj.

La Red.



Religia aktivado en templo



Prezentado sur stempo



Tendoj sur la antikva vojo

Gimnastiko sur seĝo

de TIE BIN, QUN YING kaj YU YAN

HOMOJ, kiuj longe laboras ĉe skribotablo, tre facile suferas de doloro en muskoloj, precipe en la kolaj, ŝultraj, dorsaj muskoloj kaj tiuj de la supraj membroj. Kun tempopaso ilin atakas kronika lezo.

Gimnastiko sur seĝo estas elpensita por la homoj longe laborantaj ĉe skribotablo. En la bildoj la ombritaj partoj montras ekzercendajn muskolojn.

La gimnastiko konsistas el 6 partoj kun 12 movoj. Oni povas fari ĝin en malpli ol 5 minutoj. Ĉiutaga farado estas tre utila al la ekzercantoj.

I. Ekzerco de la kolo

A. Sidu sur seĝo, tenante la randojn de la seĝo per ambaŭ manoj. Klinu la kapon kiel eble plej malsupren kaj poste levu ĝin kiel eble plej malantaŭen (Bildo 1-a).

B. Turnu la kapon flanken kun la orelobo tuŝanta la ŝultron laŭeble. Reprenu la originan pozon. Turnu la kapon al la alia flanko kaj faru la samon (Bildo 1-b).

C. Turnu la kapon flanken, kun la okuloj rigardantaj flanken-malantaŭen. Reprenu la originan pozon. Turnu la kapon al la alia flanko kaj faru la samon (Bildo 1-c).

II. Ekzerco de la ŝultroj

A. Sidu sur seĝo, kun la supraj membroj pendantaj ambaŭflanken de la korpo. Levu kaj mallevu la ŝultrojn (Bildo 2-a).

B. Metu la maldekstran manon sur la dekstran ŝultron. Per la dekstra mano subtenu la maldekstran kubuton kaj movu ĝin internen kaj malantaŭen, turnante la kapon maldekstren kun la okuloj rigardantaj maldekstren-malantaŭen. Reprenu la originan pozon. Metu la dekstran manon sur la maldekstran ŝultron kaj faru la samon (Bildo 2-b).

C. Levu la maldekstran brakon, metu la maldekstran manon sur la malantaŭan parton de la kranio. Metu la dekstran manon sur la maldekstran kubuton kaj movu ĝin internen kaj malsupren. Reprenu la originan pozon. Levu la dekstran brakon kaj faru la samon (Bildo 2-c).

Atentu:

1. faru la ekzercadon malrapide, ne tro forte nek abrupte.

2. post ĉiu ekzerco ripozu 10-20 sekundojn kaj faru la sekvantan ekzercon.

3. faru la serion da movoj aŭ kelkajn el ili laŭ plaĉo. Ripetu ĉiun movon 8-10-foje. (Datrigota)

Bildo 1-a



Bildo 1-b



Bildo 1-c



Bildo 2-a



Bildo 2-b



Bildo 2-c



En 1990 ni okazigis la unuan konkurson de EPC-legado, kiu estis bonvenigata de niaj legantoj. Pro tio ni okazigas la duan tian konkurson en la rubriko "Amuzoj" de la nuna numero. Ĉi-sube ni publikigas dek demandojn. La respondoj troveblas en artikoloj aperintaj en nia gazeto de la kuranta jaro.

Elektu unu ĝustan respondon el la donitaj, plenigu la blankojn per la signo A, B aŭ C laŭvice de la demandoj kaj algluu la paperon al la dorso de la koverta. Al la fronto algluu poŝmarkon kaj nian adresetiketon ĉi-kune metitan kaj skribu sur la koverta viajn nomon kaj adreson. Antaŭ la 30-a de novembro 1991 (laŭ la dato montrita de stampo) sendu ĝin al nia redaktoro s-ro Li Qiang.

La vicoj de la sukcesintoj en la respondo de ĉiuj demandoj estos deciditaj per loto:

La sola gajninto de la unua premio estos premiita per unu pentraĵo farita de la ĉina pentristo Guo Shifu.

Ĉiu el la 10 gajnintoj de la dua premio estos premiita per unu granda papertondaĵo de Yuxian-gubernio de Ĉinio.

Ĉiu partoprenantoj ricevos unu malgrandan papertondaĵon de Yuxian-gubernio.

La respondoj estos publikigitaj en la n-ro 12 de nia gazeto en 1991 kaj la nomaro de la premioj aperos en la n-ro 2 de la gazeto en 1992.

La Red.

DEMANDARO POR LA KONKURSO

1. La 76-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en

A. Varsovio de Pollando; B. Pekino de Ĉinio; C. Bergeno de Norvegio.

2. En 1992 la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto okazos en

A. Ŝanhajo de Ĉinio; B. Qingdao de Ĉinio; C. Tokio de Japanio.

3. La novelo "Jarfino" de Chun-

Chan Yeh, veterana ĉina esperantisto kaj verkisto, estas verkita en

mondo estas

A. "Biografio de la Reĝo Gesar" de Ĉinio; B. "Maha Bharat" de Hindio; C. "Iliado" de Grekio.

5. La 23-a de majo 1991 estis la -a datreveno de la paca liberigo de Tibeto.

A. 30; B. 40; C. 35.

6. La Qinghai-Tibeta Ŝoseo etendiĝas sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo meznombro alta super la marnivelo.

A. 4731 m; B. 3931 m; C. 4000 m.

7. La plej suda urbo sur la Suda Silka Vojo en Ĉinio estas

A. Baoshan; B. Ruili; C. Kunming.

8. La ponto "Trezora Zono" de Ĉinio, kun plej multe da arkaĵoj, havas arkaĵojn.

A. 53; B. 72; C. 61.

9. kreis kapakupunktur.

A. He Shenshu; B. Jiao Shunfa; C. Xu Shitian.

10. La tipa loĝejo de Pekino estas

A. "pendanta" domo; B. kaverno; C. kvadrata korto.



Pri la dua konkurso de EPC-legado

A. Esperanto; B. la angla lingvo; C. la ĉina lingvo.

4. La plej longa epopeo de la

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

El Popola Ĉinio
Poŝkesto 77
100037 Pekino
Ĉinio

Al s-ro Li Qiang


Kortegaj kombiloj

Fotoj de XIN ZHI

Kombilo estas ordinara vivbezonaĵo, tamen la kortega kombilo de Changzhou, suda Ĉinio, estas konata kiel distingiĝa me-tiartaĵo.

Popolaj artistoj faras delikatajn kombilojn el bukso kaj bambuo kaj gravuras, pentras aŭ gofras sur ili homfigurojn, florojn, birdojn kaj bestojn kaj la artaĵoj estas sufiĉe ĉarmaj kaj multe ŝatataj.

Jam antaŭ 1 500 jaroj Changzhou-anoj komencis fari kombilojn por la kortego kaj pro tio oni nomas la kombilojn kortegaj. ia artaĵo servas ankaŭ kiel ornamaĵo sur hararo aŭ brusto kaj de la lastaj jaroj ĝi estas tre ŝatata de turistoj.



BRUO difektas la sanon kaj kaŭzas multan ĉagrenon al la homa vivo. Tamen sciencistoj faras esploron, por ke ĝi estu favora al la homaro.

Produkti Elektron per Bruo. Bazante sin sur la principo, ke sub certaj kondiĉoj malhelpata sono turniĝas en elektron, britaj sciencistoj sukcese faris membranan son-kolektilon. Se oni kunligas ĝin kun sonenergia resonatoro kaj energia transformilo, la kaptita bruo povas turniĝi en elektron. Laŭ mezuro, kiam bruo farita de reaktoro de jeto estas 160 decibeloj, la sonenergia atingas 10 000 vattojn, kaj la sonenergia de ordinara motoro atingas milojn da vattoj. El tio videblas, ke per bruo produkti elektron estas esperebla.

Diagnozi Malsanojn per Bruo. Kiam malsano okazas ĉe iu korp parto, ties temperaturo ŝanĝiĝas kaj ĝi varias laŭ malsameco de malsanaj korp partoj kaj specoj de malsanoj. Kiel eksperimento pruvigis, kiam histoj de la korpo estas priradiata de elektraj ondoj, molekuloj kaj atomoj de viva histo faras neregulan termovibradon kaj eligas bruon. Ju pli alta estas la temperaturo de korp parto, des pli forta estas la bruo. Sin bazante sur la supre dirita principo, sovetiaj sciencistoj proponis determini la lokon kaj konturon de fokuso de infekto kaj inflamo per elektroak-

Favorigi bruon al la homaro

de SUN DAXI

ustika aparato. Kompreneble, la bruo estas neniel aŭdebla por la homa orelo pro siaj tro malforta intenseco kaj tro alta frekvenco.

Utiligo de Bruo en Agrikulturo. Usona sciencisto trovis, ke la poroj sur radikoj, tigoj kaj folioj de plantoj pligrandiĝas, kiam ili estas ekscititaj de certa bruo. Tio plifortigas la kapablon de plantoj sorbi nutraĵon. Por tiu celo li pli-ol-30-foje donis per fajfilego bruon de 100 decibeloj al tomataj plantaĵoj sur eksperimenta kampo. La traktitaj tomatoj estis pli multaj kaj pli grandaj ol la netraktitaj. Kaj la produktokvanto pliiĝis 9-oble.

Bruo Helpas Sarkadon. Sciencistoj malkovris, ke malsamaj vegetaloj havas malsamajn sensivecojn al diversondaj bruoj, kaj plie, bruo povas fruiĝi aŭ malfruiĝi ĝermadon de semoj. Surbaze de la fenomeno, oni elfaris bruon sarkilon. Ĝi sendas al tersurfaco bruon de antaŭdifinita ondolongo por fruiĝi ĝermadon de semoj de herbaĉoj. Tiele oni povas sarki kampion per herbicido antaŭ elkresko

de kultivitaj plantoj.

Sekigi Mangaĵojn per Bruo. Kutime oni sekigas mangaĵojn per varmigo, kio perdigas al ĝi nutroelementoj. Usonanoj prenas teknikon de rapida sekigo de mangaĵoj per bruo kaj malaltfrekvenca sono. La akvosorba povo de la tekniko estas 4-10-oble pli granda ol tiu de la tradicia tekniko kaj la kvalito de la mangaĵoj multe pliboniĝis.

Per Bruo Senigi Bruon. Laŭ la principo, ke sonoj malsamafazaj kaj egalintensaj povas malaperi post ilia reciproka ago, britaj sciencistoj elpensis metodon de senigo de bruo per bruo. Ili registris bruon de motoro per magnetofona sonbendo kaj kalkulis la intensecon de bruo per komputilo kaj sensaparato. Post tio ili reproduktis inversfazan kaj egalintensan bruon por ke ĝi senigu la bruon. La metodo povas esti efike aplikata al diversaj motoroj kaj aŭtoj.

Brua Armilo. Por bremsi raptakton de aviadilo speciala trupo de Germanio ĵetis bruajn grenadojn en la kajuton. Ĉe eksplodado svenis ĉiuj personoj en la aviadilo. La teroristoj estis kaptitaj kaj post iom da tempo la pasaĝeroj kaj pilotoj rekonsciĝis. La kaŭzo kuŝis en tio, ke eksplodante, la grenadoj produktis bruon, kiu tuj paralizis la aŭdadon kaj centrajn nervojn de homoj kaj svenigis ilin por mallonga tempo. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Por ekspozicio dum UN-Konferenco/92 en Brazilo, mi petas pmojn, bkojn kaj afiŝojn pri ekologiaj temoj. Kunlaboroj bonvenas Aristophio Alves, PK 796 - BR - 57001, Maceio/AL.

* Fakulo pri Radio - TV - dez. kor. kun samfakuloj aŭ ĉiuj kiuj povas helpi min malfermi elektronikan vendejon. Bonvolu skribi al: Foley. A Ekue, BP 13071 Lome, Togo.

* Stanislaw Fischer deziras korespondi kaj interŝanĝi filatelaĵojn. Adr.: Bulgarska 8/8, PL-64-100 Leszno, Pollando.

* Klubkontaktoj serĉataj. La Esperanto-klubo "Renaskiĝo" volas korespondi kun kluboj, dezirantaj serĉi interesajn kaj aktivajn formojn de la Esperanto-laboro, ekzemple: interŝanĝo de bildkartoj, pentraĵoj, fotografiaĵoj por ek-

spozicii; interŝanĝo de turistaj grupoj; propagando de Esperanto. Por ni estos ĝojige ricevi interesajn proponojn. Respondo garantiata. Korespondadreso: Kuzmenko Larisa, 622013 Sverdlovskaja obl, u. N. Tagil, Kusvinskaja str. 25 "A", USSR.

* Krylova Jrina Aleksankrovna, 15-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Statgbinyнку 4-54, Klaipeda 235815, Litovio, USSR.

* Zuzana Bacikova, 29-j. esperantistino, dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: Na strani 8, 742 35 Odry, Ĉeĥoslovakio.

Memore al s-ro Tikos

FORPASIS antaŭ 8 jaroj s-ro Tikos, eminenta esperantisto, kiu dediĉis sian tutan vivon al la idealo de L. L. Zamenhof.

La ĉina nomo de Tikos estis Fang Shanjing, lia alia nomo estis Fang Zijing kaj plumnomo — Jiao Feng. Li naskiĝis la 21-an de decembro, 1907, en Pekino.

La prapatroj de Tikos vivis en Zhenhai, Zhejiang-provinco. Lia avo estis riĉulo en Zhenhai kaj havis siatempe kelkajn privatajn bankojn. Lia patro, eminenta sukcesinto en la provinca ekzameno laŭ la feŭdisma sistemo, havis oficon en la Jura Ministerio de Qing-kortego. Kiam Tikos estis 3-jara, lia avo forpasis. Nelonge post tio eksplodis la Revolucio de 1911. Bankrotis la privataj bankoj de la familio de Tikos kaj kolapsis lia familio. La patro de Tikos veturis al Hankou por fari negocon. Ja en tia medio Tikos pasigis sian infancon. Fininte sian lernadon en elementa lernejo, Tikos fariĝis lernoservisto en iu privata banko de Ningbo, Zhejiang-provinco kaj poste laboris kiel instruisto en iu elementa lernejo. Tiam li legis progresajn librojn kaj gazetojn kaj ekinteresiĝis pri reformo de ĉina skriba lingvo. Li adoris la grandan literaturiston Lusin (1881-1936) kaj liajn verkojn kaj korespondis kun li. Influate de Lusin, lia penso ŝanĝiĝis. La 18-an de septembro, 1931, la japanaj imperiistoj agresis Ĉinion. Tikos tre malkontentis pri la Kuomintanga registaro, kiu praktikis pasivan reziston kontraŭ Japanio, kaj eksimpatiiis la Komunistan Partion de Ĉinio. Tial li partoprenis la maldekstrulan kulturalan



S-ro Tikos (meze en la fronto) kaj ĉinaj esperantistoj

movadon gvidatan de la Komunista Partio de Ĉinio.

En 1929, kiam Tikos estis en Hankou, li ekokupis sin en la Esperanto-movado. En tiu jaro li kaj aliaj esperantistoj fondis Hankou-an Esperanto-Societon. De tiam li dediĉis sian tutan energion al Esperanto. Post tio li organizis Junularan Esperanto-Unuiĝon en Hankou. Li ofte kontribuis al la E-periodaĵo "La Mondo" eldonata en Ŝanhajo kaj subtenis ĝin finance. En tiu periodo li ofte kontaktis kun progresaj esperantistoj Ĵelezo, Hu Sheng, Ĉ. Ĉen kaj aliaj samideanoj en Ŝanhajo. En 1938 li fondis revuon "Voĉoj el Oriento" en Hankou kaj poste funkciigis ĝin en Hongkongo. La revuo kun celo propagandi la kon-

traŭjapanan rezistmiliton de la ĉina popolo havis grandan influon en- kaj eksterlande. En Hongkongo li eldonis novelojn de Lusin en Esperanto. Tiam li kontaktis ankaŭ kun esperantistoj el Rumanio, Hungario, Koreio kaj aliaj landoj kaj funkciigis revuon "Orienta Kuriero" kune kun hungara samideano.

Post naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko oktobre de 1949, Tikos prenis sur sin la ĉiutagajn laborojn de la refunkciigita Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Li gvidis Espkurson en Radio Ŝanhajo. El la kursanoj nemalmultaj poste fariĝis viglaj aktivuloj en la Ĉina Esperanto-movado. En 1954 Tikos venis al Pekino kaj laboris en la Popol-literatura Eldonejo kaj iom

poste li transposteniĝis en la Ĉinan Esperanto-Ligon. En la jaroj, kiam li laboris en la redakcio de El Popola Ĉinio, li fakte gvidis la tradukajn aferojn de la redakcio. Li dediĉis sian tutan energion al la revuo.

En la traduka sekcio de la redakcio li kun granda entuziasmo kulturis junajn esperantistojn. Li obstinis en tio, ke pli da esperantistoj sin okupu pri polurado de tradukaĵoj. Ĝuste dank' al tiu gvidpenso s-ro Li Shijun (Laŭlum), esperantisto juna siatempe, elmontris sian talenton, prenis sur sin la pezan taskon poluri tradukaĵojn kaj poste fariĝis fama Esperanto-poeto en kaj eksterlande kaj membro de la Akademio de Esperanto.

S-ro Tikos ĉiam senrezerve konigis al junaj laborantoj de la redakcio siajn tradukajn materialojn. Li ordigis siajn spertojn en la tradukado, mimeografis ilin sub titoloj "Notoj de Lernado kaj Tradukado", "Lernado kaj Progresigo". Li kolektis ankaŭ la rimarkojn de eksterlandaj samideanoj pri la esperantigitaj noveloj de Lusin, mimeografis ilin por ke la laborantoj referencu kaj pluapaŝe levu sian tradukan nivelon.

Komence de la 50-aj jaroj, Tikos konigis al la ĉinaj esperantistoj la eksterlandajn Esperantajn lega-

jojn kia "La Faraono", kolektitajn de li dum multaj jaroj. Tio sendube estis grava por la tiamaj ĉinaj esperantistoj, por kiuj estis malfacile trovi alilandajn Esp-legaĵojn.

Fama ĉina esperantisto prof. Saint Jules Zee (1902-1986) faris apartajn kontribuojn al esperantigo de la klasikaj ĉinaj poemoj. Tikos kolektis la poemojn tradukitajn de Saint Jules Zee, mimeografis ilin kaj fine eldonis ilin sub titolo "El Ĉina Poezio" en 1980 pere de la redakcio de El Popola Ĉinio. Tio estas grava paŝo por konigi la klasikajn ĉinajn poemojn al la tutmonda esperantistaro.

Ĉinio kelkfoje eldonis "Noveloj de Lusin" en Esperanto. Tikos faris apartajn kontribuojn en tiu laboro. Li organizis ĉinajn esperantistojn por la tradukado, sin turnis al la eksterlandaj samideanoj por peti iliajn opiniojn pri la tradukaĵoj. Kompreneble ankaŭ li mem esperantigis iujn novelojn de Lusin. Iu eksterlanda samideano diris: "La Esperanta 'Noveloj de Lusin', eldonita de Ĉinio estas bonkvalita. Ĝi multe helpis min en solvo de malfaciloj, kiujn mi renkontis en la anglalingva versio."

Ke Tikos dediĉis tiel grandan entuziasmon al Esperanto, tio baziĝas sur lia patriotismo. En 1930, nelonge post lia esperantistiĝo, li skribis en la revuo "La Espero", n-ro 11: "Ja estas hontinde, ke en

libera sendependa ŝtato oni prenas alilandan lingvon kiel la ĉefan lingvon en institucioj de sia propra lando, sed rigardas sian nacian lingvon kiel la dependan." Li firme staris kontraŭ la lingva diskriminacio, opiniante, ke estas necese strikte kombini Esp-movadon kun la nacia revolucio. Ĝuste pro sia patriotismo, li eldonis "Voĉoj el Oriento" en la kontraŭjapana rezistmilito.

Post ekpraktiko de la politiko pri reformado kaj pordmalfermo en Ĉinio, li, la unua, sin okupis pri starigo de Espranta korespondalerno, reeldono de Nova Vortaro Esperanta-Ĉina kaj aliaj Esperantaj legaĵoj. La Xinhua-a Esperanta Korespondalerno, fondita ĉefe de li, elkulturis amon da esperantistoj, el kiuj multaj estas elitaj personoj en la nuna Esp-movado de Ĉinio. Post tio sur la vasta teritorio de Ĉinio aperis diversaj Esperanto-kursoj, Esperantaj korespondalerno kaj Esperanto-asocioj. Ĉio ĉi metis firman bazon por la 71-a UK, kiu sukcese okazis en Pekino, 1986.

Pro malsano Tikos forpasis la 6-an de novembro, 1983. Tamen liaj aferoj brilas por eterne. Li estis eminentulo de la maljuna generacio de la ĉina esperantistaro kaj ankaŭ brila ekzemplo por la junaj daŭrigantoj de la ĉina E-movado. ■

Kondolenco



Kun granda malĝojo ni informiĝis, ke s-ano E. J. Woessink forpasis je la 16-a de junio 1991.

S-ano Woessink estis tre fervora aktivulo en la Esperanto-movado mondscale. Li funkciis kiel estrarano de UEA de 1960 ĝis 1977.

Same kiel sia edzino s-anino Akiko Woessink-Nagata, kiu forpasis en januaro 1990, s-ano Woessink estis nia multjara amiko. Li kaj lia edzino vizitis nin unuafoje en 1976 kaj multe kontribuis por efika kunlaboro inter UEA kaj ĈEL kaj EPC kaj por la okazigo de la 71-a UK en Pekino.

La Morto forrabis de ni s-ron Woessink kaj ni perdis nian bonan amikon. Tamen ĉinaj esperantistoj karmemoros lin ĉiam kun profunda estimo kaj dankemo.

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de El Popola Ĉinio

Drinkema, frenezuma kaj sarkasmema filozofo

de HOU JUELIANG

RUAN Ji (210-263) estis genia poeto kaj filozofo, honorita per “eminenta intelektulo”. Li vivis en tumulta epoko kun malluma politiko. Tiam dinastio estis anstataŭigata. Aperis du politikaj blokoj, kiuj interluktis por la regpotenco. Ambaŭ blokoj intencis enoficigi lin por profiti de lia famo. Ruan Ji bone konis la danĝeron de politika batalo. Kiam la du blokoj streĉe batalis, li rifuzis la enoficigon, senbride drinkis kaj ŝajnis sin freneza. Kiam konspiristoj svingis buĉilojn, Ruan Ji kondukis “singardeme”, ne diskutante pri politiko nek juĝante pri homoj. Tiamaniere li evitis malfeliĉon en la komplika politika situacio. Kiam unu bloko venkis la alian, li devigite oficistigis. Tamen venis alia ĉagreno al li, kiam li estis inter regantoj. Ĉefgeneralo Sima Zhao ŝatis lian filinon kaj sendis svati ŝin por sia filo, Sima Yan (Sima Yan poste fariĝis la unua imperiestro de Jindinastio). Por ordinaraj homoj tio estis tre honora kaj ĝojiga afero. Tamen Ruan Ji ne volis sin kroĉi al potenculoj. Kion fari? La malnova ideo reaperis al li en la kapo — li do denove drinkadis kaj ŝajnis sin freneza. Tute “ebria”, li kuŝis sesdek tagojn, ke la svatanto havis nenian ŝancon por fari la proponon kaj foriris.

En la aĝo de tri jaroj Ruan Ji perdis sian patron kaj vivis mizeran vivon kune kun la patrino. En sia juneco li ŝatis poemon kaj muzikon. Historia libro diras, ke Ruan Ji estis belaspekta, senĝena, fiera kaj arbitra. Li oponis kontraŭ la feŭda etiketo, agis strange kaj

senceremonie. Li ofte estis nuda en la ĉambro. Li diris, ke li prenas la spacon sub la ĉielo kiel ĉambron, la domon kiel pantalonon. Kiam oni eniris lian kabineton, li demandis: “Kial vi eniris en mian pantalonon?” Per tia ekstravaganca maniero li montris sian malestimon al la feŭda etiketo katenanta la homan liberecon. Li malestimis konfuceanojn strikte obeantajn la feŭdan etiketon. Kiam intimaj amikoj lin vizitis, li favore akceptis ilin; sed al vulgare konfuceanoj li montris la okulblankon. Tiamaniere li ofendis multajn homojn.

Vivante en la epoko, en kiu oni ne havis liberecon de parolo, li suferis de mensa sufoko. Li ofte sin fermis en kabineto kaj legis tutajn monatojn, aŭ ekskursis sur monto kaj ĉe rivero, forgesante hejmeniri. Li ĉie vagis, drinkis, ludis liron, sin amuzante en malĝojo. Li alte taksis taoismon. Por ekspliki la filozofian penson de Laozi kaj Zhuangzi, li verkis famajn aritikolojn. *Biografio de granda sinjoro* estis lia ĉefverko. Li faris detalan kaj profundan studon pri filozofiaj *Yi Jing*, *Laozi* kaj *Zhuangzi*, ĝuste eksplikis ilin kaj disvolvis la materiisman elementon en taoismo. Tiuflanke li agis malsame ol aliaj mistikistoj, kiuj interesiĝis nur pri la negativaj eroj en la penso de Laozi kaj Zhuangzi. Kontraŭ la malluma politiko iuj mistikistoj ne kuraĝis rezisti. Anstataŭe ili postulis, ke oni forgesu sian malfeliĉon, submetiĝu al la realo, agu laŭtendence kaj estu kontenta je tio, kion oni havas. Sed Ruan Ji estis maltrankvila en rezisto. Li senbride drinkis, ŝajnis sin freneza kaj laŭte la-

mentis. Jen unu el liaj rezistaj manieroj. Li havis varman koron kaj, kun larmaj okuloj, frontis al la vivo.

La filozofia penso de Laozi kaj Zhuangzi havis sian propran sistemon, kiu diris, ke la mondo estas unu tuto kaj la plej alta filozofia kategorio estas “tao”. Ili eksplikis plue, ke “tao” naskas ĉiujn estaĵojn. La vidpunkto, ke la ĉielo kaj tero estas en unu tuto, markis impeton en la disvolvado de la antikva filozofio kaj grandajn kontribuojn de taoistoj al filozofio. Sed estas malĝuste klarigi la unuecon de la mondo per ideisma vidpunkto, ke “tao” naskas ĉiujn estaĵojn. Tio montris ilian teorion mankon.

Ruan Ji profunde konis la penson de la taoistoj, tamen li ne blinde ĝin heredis, sed prenis kaj disvolvis nur ĝian utilan parton. Li ne konsentis la vidpunkton, ke “tao” naskas ĉiujn estaĵojn, sed opiniis, ke “la ĉielo kaj la tero naskiĝis de la naturo, kaj ĉiuj estaĵoj naskiĝis de la ĉielo kaj tero”. Tiamaniere li faris materiisman klarigon pri la naskiĝo de la universo, neis la konceptan “tao”-n, kaj certigis, ke inter la ĉielo kaj tero estas nenio alia ol la estaĵoj. Li opiniis,



ke la estaĵoj inter la ĉielo kaj tero estas malsamaj, diversaj, tamen esence egalaj, ĉar ĉiu el ili ĉiuj konsistas el la materia "ĉi-o", kiu kaŭzas prosperiĝon kaj degeneriĝon de ĉiuj estaĵoj. Ĉiuj estaĵoj posedas materiecon kaj movecon, tiusence ili estas tute egalaj. Ruan Ji klarigis la egalecon kaj malsamecon de ĉiuj estaĵoj kaj emfazis la unuan, kun la intenco pruvi sian mondkoncepton: "La estaĵoj en la universo nature estas en unu tuto". Ĝi interpretiĝis en la hodiaŭa filozofia lingvo kiel jene: la universo estas materia, unueca kaj neapartigebla.

Influite de Zhuangzi, Ruan Ji tenis relativisman vidpunkton en sia filozofio. Li ne absolutigis diferencon inter aferoj. Li diris, ke laŭ vivipovo ĉiuj estaĵoj estas longvivaj, dum laŭ la vidpunkto de morto ĉiuj estaĵoj estas mallongvivaj. Oni povas rigardi mortintan infaneton kiel longvivulon kaj la okcentjaran Peng Zu (mita longvivulo en la antikva Ĉinio) kiel mallongvivulon. Lanugero povas esti rigardata kiel granda, dum la monto Taishan kiel malgranda. Laŭ la vidpunkto de malgrandeco ĉiuj estaĵoj estas malgrandaj kaj laŭ la vidpunkto de grandeco ĉiuj estaĵoj estas grandaj. Necesas la eksplikado de Ruan Ji pri la relativisma penso de taoismo, ĉar tio helpis siatempe forigi la rigidan pensmanieron de tiuj homoj. Bedaŭrinde, same kiel Zhuangzi, Ruan Ji ne povis ĝuste trakti la rilatojn inter relativo kaj absoluto. Parolante pri la relativeco de aferoj, li neglektis la naturan diferencon inter ili kaj konfuzis la bonan kun la malbona, la pravan kun la malprava.

Cirkulis legendo: Ruan Ji vojaĝis al la monto Sumen kaj hazarde renkontis anoniman ermiton, kiu prenis bambuajn semojn kiel manĝaĵojn. Ili amikiĝis kaj parolis pri moralaj principoj en la praa socio. Tiu maljuna ermito ne sciis, kiam li naskiĝis. Li "hardas sian humoron, longigas la vivon, kaj brilas kiel la naturo". Li "prenas kvinmil km. kiel unu paŝon kaj jarmilon

kiel unu tagon", "silente esploras moralon, sin apartigante de la mondo". Ĉe adiaŭo la ermito ridetis senparole kaj eligis laŭtan sonon kiel fenikso, Ruan Ji komprenis la sonon. Reveninte li verkis la artikolon *Biografio de granda sinjoro*. Ĝi estas filozofia verko. Pere de parolo de la granda sinjoro (la ermito), li elverŝis sian aspiron, malkovrante la hipokritecon de la feŭda etiketo kaj esprimante sian historian koncepton.

La artikolo odoras fortan ironion. En ĝi li priskribis tiujn "ĝentilulojn", kiuj, fidele sekvante la etiketon, estas ceremoniemaj kaj rutinemaj eĉ en parolo kaj paŝado, kaj ĉiam legas librojn de saĝuloj kaj priparolas antikvan moralon. Li analizis ilian internan mondon: Ili tamen deziras nur sekurigi sian propran feliĉon, ricevi altrangan oficon, akiri multan riĉaĵon, "eternigi sian prestiĝon kaj egaligi sian meriton al tiu de antikvaj herooj". Tiuj "ĝentiluloj" ŝajne sekvas la etiketon kiel honestuloj, sed fakte ili havas abomenindan animon kaj klopodas nur por si mem. Ruan Ji diris, ke tiuj hipokrituloj estas kvaŭzaŭ pedikoj kaŝiĝantaj en pantalone, en kiu ili rampas tien kaj reen, prenante ĝin kiel belan paradizon. Malsataj, ili mordas homon, la neelĉerpeblan manĝaĵon por ili. Sed la pantalone ne estas sekura. Kiam ĝi brulos, la pedikoj sendube mortos. Ruan Ji aludis per pantalone la siatempan kortegon kaj per pedikoj la "ĝentilulojn", kiuj opiniis, ke ili povas trankvile kaj sekure suĉi homan sangon, sekvante la etiketon kaj obeante la kortegon. Fakte la kortego ne povas longe protekti la "pedikaron", kiu pereos tuj kiam la "pantalone" forbrulos.

En la artikolo Ruan Ji kritikis monarkismon. Li diris, ke en la antikva socio estis nek monarko, nek kortegano, tamen bona estis la socia ordo. Poste en la socio aperis ĉantaĝo kaj trompo, kaj sekve monarko kaj korteganoj. La apero de la monarko kaj korteganoj ne estas io bona, sed malbona. Post apero de monarko, naskiĝas tiran-

ismo. Korteganiĝinte, oni komencas malbonkondukti. Li rigardis la monarkon kaj korteganojn kiel fonton de la socia tumulto kaj katastrofo de la popolo. Tio estis aŭdaca penso kontraŭ monarkismo, kiel brila falstelo en malluma nokto. Li malkovris krimojn de la monarko kaj korteganoj, dirante, ke por kateni la penson de la popolo ili elŝpinis la feŭdan etiketon. Li opiniis, ke la etiketo estas hipokrita. Tiuj, kiuj observas la etiketon, ŝajnas honestaj kaj bonkoraj, sed fakte estas avidaj kaj insidemaj. La etiketo ne povas bridi hipokritulojn, sed nur trompi stultulojn. Li diris, ke la monarko zorgas ne pri la popoloj, sed nur pri si mem, pri kapto de ĉiuj trezoroj de la lando kaj kontentigo de sia senlima dezirego pri ĝuado kaj diboĉo. Se la monarko tiel diboĉados, finfine la popolo ribelos. Tio maltrankviligas la monarkon kaj tiu do aplikas alian rimedon — premii alte kaj puni severe. Li opinias, ke alta premio plaĉas kaj severa puno timigas, kaj tiel la socia ordo boniĝos. Tamen nek alta premio nek sena puno efikos. La lukto inter la malriĉaj kaj riĉaj, inter la nobelaj kaj plebaj pli kaj pli akriĝos kaj finfine pereigos la monarkion. Ruan Ji prave atribuis la socian tumulton al la fiago de monarko kaj korteganoj. Sed li opiniis la feŭdan socion kun monarko kaj korteganoj malpli supera ol la primitiva socio sen ili. Tio montris la regresan historian koncepton de taoistoj.

En la ĉina literatura historio, Ruan Ji estis fama poeto. Liaj poemoj estis malfacile kompreneblaj, tamen kun forta gusto.

"Al la ĝarden' eosta, pad' kondukas,

ĉar tie prunoj kaj persikoj sukas."

Li komparis sin kun persikujo kaj prunujo, kiuj, kvankam silentaj, havas multe da adorantoj, kiuj sinsekve venas al ili kaj estigas voĵeton pro sia paŝado. La poeto diris:

Tri juanoj*

MI estas pakistanano studanta en Pekino. En la someraj ferioj ĉi-jare mi vojaĝis al Hongkongo. Mi revenis al Pekino kun multe da pakaĵoj. Mia amiko promesis veni al la stacidomo por min helpi. Mi atendis lin longe, sed ne trovis lin.

Kiam mi estis maltrankvila, mi vidis viron vagadanta proksime. Li estis malgrasa, pala kaj mezastatura, lia nigra pantalonino malpura kaj ĉifona. Krome ŝirigis la dekstra ŝultro de lia ĉemizo. Liaj vestoj surhavis polvon, ŝajne li dormis surtere. Tie li staris, ĵetis la rigardon jen al mi, jen al miaj pakaĵoj. Kiam lia rigardo renkontis la mian, li movetis la lipojn, ŝajne volis alparoli min. Sed li nenion diris.

Mi salutis lin. Ekbrilis liaj okuloj. Li iris renkonte al mi, respondante mian saluton. Mi demandis, kiel li nomiĝas, ĉu li iun atendas. Li diris, ke lia familia nomo estas Li kaj li estas kamparano de fora provinco. Li venis al Pekino por serĉi laboron, aŭdinte, ke en Pekino oni povas facile trovi laboron. Sed anstataŭ trovi laboron, li per-

dis sian monon kaj ne povis reiri hejmen. Sen mono li tranoktis en la atendejo de la stacidomo. Mi tre simpatiis kun li kaj intencis helpi lin per kelka mono. Sed li fordankis, proponante: "Vi kunportas tro multe da pakaĵoj. Se vi permesos, mi portos viajn valizojn ĝis la taksi-stacio. Kaj vi povos pagi al mi pro tio." Ĉar mi estis intencanta havigi al mi taksion, mi volonte akceptis lian proponon.

Mi demandis, kiom da mono li postulas. Kaj li diris, ke tri juanoj jam sufiĉas. Mi ĝoje konsentis kaj li jam prenis miajn du grandajn kofrojn kaj ekiris eksteren. Mi sek-



vis lin kun aliaj miaj valizoj.

La stacidomo estis plenplena de homoj kaj ni trairis kun malfacilo. Subite mi trovis mian amikon aliranta al la elirejo. Mi tuj iris al li kun voko. Subite mi ekpensis pri s-ro Li kaj ĉirkaŭrigardis, sed li ne estis. Mi kaj mia amiko ne sukcesis trovi lin malgraŭ longa serĉado. Ni certigis, ke li ŝtelis la kofrojn, kaj tuj iris al la policejo por anonci la okazaĵon.

La sekvantan tagon mi sidis en mia ĉambro, kun ĉagreno pri miaj du perditaj kofroj. Subite mi aŭdis pordo-fraŭon. Mi malvigle iris malfermi la pordon. Mi ekkriis de ĝojo, ne povante kredi al miaj okuloj: "Ho, estas vi, sinjoro Li!" S-ro Li staris ĉe la pordo, kun la kofroj. Li klarigis al mi, ke li perdis min pro tromulteco de la homoj en la stacidomo, ke li serĉadis min plurajn horojn ĉe la stacidomo kaj atendadis ankaŭ longe ĉe la taksi-stacio. Nun li venis al mia loĝejo laŭ la adreso sur la etikedo de la kofro.

Mi invitis lin en mian ĉambron por iel regali lin, sed li fordankis, dirante, ke li estas okupata de alia afero. Mi tuj elprenis mian monujon kaj diris al li, ke la tuta sumo en la monujo apartenas al li (en la monujo estas 164 juanoj). S-ro Li prenis la monujon, elprenis el ĝi 3 juanojn kaj redonis ĝin al mi. Post tio li adiaŭis min kaj foriris. ■

Juano estas ĉina monunujo, 5.34 juanoj egalas al unu usona dolaro.

*"Aŭtuna vento herbojn nur for-
blovas,
nun komenciĝas jam pere', dis-
falo;
velkiĝon pompo kaj lukseco ko-
vas,
kaj dornoj sin etendas en la
halo."*

Jen malprospera sceno, per kiu la poeto montris sian splenon. Li sentis, ke la homa vivo estas kaprica, jen kiel pompa floro, jen kiel velkaj petaloj.

*"Inter la nuboj flugas nigra
gruo,
aŭdiĝas ĝia sombra, trista krio.
Al la ĉiel' lazura ĝi sin levas,
la krio ĉesas, for de l' mondo
vanta!"*

*Ĉu kun koturnoj ludi ĝi do de-
vas?*

Ili ja folas en la korto granda."

Nigra gruo alten flugas, ne volas ludi kun koturnoj. Tio montris la noblecon de la poeto, kiu ne volis

kontaktiĝi kun vulgaretoj. Tamen la gruo estas malĝoja, ĉar ĝi ne efektivigis sian aspiron, ĝi do decidis ĉiam silenti — jen figuro de la poeto mem. La poeto deziris potencigi la landon same kiel antikvaj kapabluloj, sed, bedaŭrinde, la objektiva kondiĉo limigis lin. Deveninta el malriĉa familio li ne povis eniri la superan socion kaj ne havis ŝancon starigi meriton. Jaroj pasis, la poeto povis nur elverŝi sian doloron per siaj poemoj. Liaj poemoj estas vivecaj, kaj interesaj. ■

EKONOMIO

● Raportis la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio, ke la ĉinaj kamparanoj prenas varmokvanton pli grandan ol tiuj en la disvolviĝantaj landoj, kaj proksiman al la monda meznombra kvanto de 2 630 grandaj kalorioj. Sed la varmokvanto el animalaj manĝaĵoj estas egala al tiu en landoj malmulte enspezantaj. Tion kaŭzis la kutimo de la ĉinaj kamparanoj, ke ili manĝas ĉefe grenon.

● Antaŭ nelonge oni trovis en la diamanta minejo en Dalian de Ĉinio diamanton de 60.15 karatoj. Ĝi estas la kvara granda diamanto en Ĉinio. La plej granda diamanto de Ĉinio de 158.786 karatoj, trovita en Shandong-provinco, 1977, estas nomata "Changlin-diamanto".


KULTURO

● Antaŭ nelonge plurfunkcia "Azia Kinourbo", la unua en Azio, estis konstruita en Changzhou de Jiangsu-provinco. La kinourbo kun areo de 15 000 m² havas 4 projekciejojn ekipitajn per sterea akustiko kaj 3 salonojn armitajn per laseravideodiskaj aparatoj. En la kultura, komerca kaj manĝaĵa stratoj en la kinourbo troviĝas butikoj sonbenda, videobenda, filmoserva, delikataĵa, vesta kaj ankaŭ restoracio, banko, kafejo, balejo kaj karaokejo.

● La Granda Muro, la Imperiestra Palaco, la ruinoj de Pekin-homoj, la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kaj la ŝtonkavernaro Mogao ĉe Dunhuang estis enlistigitaj de la Komitato de Mondaj Heredaĵoj sub UNESKO kiel mondaj heredaĵoj. Komisiito de la Ŝtata Administracio de Historiaj Restaĵoj de Ĉinio akceptis en la Imperiestra Palaco la legitimacion donitan de UNESKO.

Ĝis nun la ĉina registaro jam proklamis 500 lokojn ŝtatnivelaĵ protektendaj historiaj restaĵoj kaj 5 192 lokojn provincolnivelaĵ protektendaj historiaj restaĵoj. Ili ĉiuj estas riĉaĵoj komunaj kaj por la ĉina nacio kaj

Ĉinaj naĝistinoj Wang Xiaohong (maldekstre) kaj Qian Hong (dekstre) gajnis respektive la ĉampionecon kaj subĉampionecon en la konkurso de virina 100-metra papili-naĝo en la 16-a Monda Studenta Sportkunveno.



por la tuta homaro.

● Aperis lastatempe serio da bildlibroj pri la ĉina klasika milita verko "Sunzi pri Arto de Milito". La libroserio enhavas 5 000 ilustraĵojn al la verko el 6 000 ideogramoj.

La libro "Sunzi pri Arto de Milito", verkita de fama milita strategiisto Sun Wu (Sunzi estas respektativa nomo) antaŭ 2 500 jaroj, estis tradukita en plurajn lingvojn. En la lastaj jaroj furoris en la mondo la studo pri la verko, kaj multaj militaj principoj de Sunzi estas aplikitaj en la kampoj de politiko, ekonomio, diplomatio, sporto k.a.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La unua subakva roboto estas elfarita en Shenyang. Tiu novtipa subakva mekanismo aspektas kiel kosmonaŭto. Ĝi altas 2.1 metrojn kaj pezas 650 kilogramojn. Ĝi povas labori 300 metrojn sub la akvo. Kun antaŭenpuŝa maŝino sur la dorso kaj artikigitaj membroj, la roboto povas libere moviĝi en akvo. Ĝi povas teleregate labori en forta marfluo kaj malbonega cirkonstanco.

● Antaŭ nelonge oni ekspertizis la sciencan esplorado pri Hanas-lago en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj proklamis, ke la transdirata Hanas-monstro fakte estas granda huĉo (*latine Hucho taimen*). La fiŝo troviĝas en Sovetunio, Mongolio, Koreio kaj Ĉinio. Pro malgranda kvanto la fiŝo estis rigardata kiel diaĵo. Pro la stabila ekologia medio de la lago kaj maloftega vizito de homoj la huĉoj en la lago estas grandaj kaj longevivaj. Ĝenerale la fiŝoj longas 2-3 metrojn. La rekorda longo de observita huĉo estis 3.73 metroj kaj la pezo superis 500 kilogramojn. La lago profundas 188.5 metrojn. En serena somera tago oni povas facile vidi dekojn kaj eĉ centon da huĉoj naĝantaj akvosurface. En sunlumo la fiŝoj brilas per violeta koloro.

SPORTO

● En la 16-a Monda Studenta Sportkunveno ĉinaj studentoj gajnis 20 orajn, 17 arĝentajn kaj 11 kuprajn medalojn. Ĉinio estis la dua en nombro de gajnitaj oraj medaloj. Tio estis senprecedenca sukceso de la ĉinaj studentoj, ekde 1977, en kiu Ĉinio komencis partopreni en studenta sportkunveno. Usonaj konkurstantoj akiris plej multajn orajn medalojn. La trian kaj kvaran lokojn en nombro de gajnitaj oraj medaloj okupis Sovetunio kaj la Korea Demokratia Popola Respubliko.

● Lastatempe aperis en Ŝanhajo la Ŝanhaja Internacia Kampara Klubo de Golfo. La golfludejo apud la lago Dianshan en la antaŭurbo de Ŝanhajo okupas areon de 1 030 000 m². Tie estas golfludejo kun 18 gazonpecoj, klubejo, ekzercejo kun 3 gazonpecoj, 12 tenisludejoj, naĝbaseno kaj vilaoj. La luksa klubo, investita de Ĉinio, Usono kaj Japanio je 18 milionoj da usonaj dolaroj, akceptas 800 klubistojn.

KIOM DA SIMETRIAJ JAROJ ONI POVAS TRANSVIVI?

La kuranta jaro 1991 estas simetria jaro, t.e., la dekstra kaj maldekstra ciferoj de 1991 estas simetria. En la 1 000 jaroj de la 11-a jarcento ĝis la 20-a estas nur dek simetria jaroj, nome 1001, 1111, 1221, 1331, 1441, 1551, 1661, 1771, 1881 kaj 1991. Estas nur unu simetria jaro en unu jarcento kaj ĝi aperas post 110 jaroj. Sendube, oni povos transvivi unu simetrian jaron, se oni ĝisvivos la aĝon de 110 jaroj, kaj ankaŭ tiu, kvankam mallonge vivinta, povas transvivi unu simetrian jaron, se li naskiĝas en la jaro tre proksima al ĝi. Kaj la homo, kvankam longe vivinta, ne povas transvivi simetrian jaron, se li naskiĝas tuj post la simetria jaro. Nur 11 jaroj estas inter la simetria jaro de la 20-a jarcento kaj tiu de la 21-a jarcento. Ili estas la jaroj 1991 kaj 2002.

Tial, la nunaj homoj povos transvivi la duan simetrian jaron, se ili vivos pliajn 11 jarojn. Tio estos malofte vidita en la homa historio.

Estas same por la periodo de la 21-a jarcento ĝis la 30-a. Ankaŭ la intertempo de la simetria jaroj 2992 kaj 3003 estos 11 jaroj. Sed tio okazos post 1 000 jaroj.

BALO POR MALJUNULOJ FURORAS EN KANTONO

Pli kaj pli furoras balo por maljunuloj en Kantono. Oni povas vidi anoncojn kaj afiŝojn pri tia balo ĉie, ĉu en strato ĉu en ĵurnalo, kiuj allogas homojn kun grizaj haroj. Kaj tio akiris sufiĉe grandan sukceson.

20 kinejoj kaj teatroj de Kantono la unuaj funkciigas balojn por maljunuloj. Ilin sekvis parkoj kaj kulturaj domoj (stacioj) de distriktoj kaj kvartaloj. Ĝenerale, ili postulas malmulte da pago. Por unu bileto oni devas pagi nur dekojn da fenoj (ĉina monunujo. Unu feno = centono de juano), aŭ unu-du juanojn. Iuj maljunaj dancamantoj diris: "La bileto kostas nur kiom dekoj da ĝjaŭzioj kun salikoka farĉo. Kial mi ne farus tion por min amuzi tri horojn en balo?"

Pli kaj pli multaj maljunuloj vizitas balojn por kontentigi sian spiritan bezonon. Kantono situas ĉe la sudorienta maro, kaj en la lastaj jaroj rapide disvolviĝis en ĝi industrio kaj komerco. La konkurenco pri negoco kaj peniga laboro faras pli kaj pli maloftaj la kontaktigon inter maljunuloj kaj tiun inter junuloj kaj maljunuloj. La maljunuloj eliras el siaj hejmoj, en kiuj ili antaŭe ricevis konsolon nur de siaj familianoj, kaj venas al baloj por serĉi samaĝajn kaj intimajn amikojn. En la baloj oni povas vidi, ke maljunuloj tri- aŭ kvinope dancas, babilante kun ĝojo. Iuj "grupetoj" akurate vizitas

balon ĉiutage. Dancado proksimigas la maljunulojn.

Alia kaŭzo pri la furoro estas, ke maljunuloj faras tion por sin sanigi per amuziĝo. Frumatena balo por maljunuloj koincidas kun ilia matena ekzercado. Danci post matena tetrinko aŭ danci kaj trinki teon estas ideala formo de sanigo por la maljunuloj. Paro da maljunaj instruistoj-geedzoj, revenintaj transmaraj ĉinoj, kiuj vivas en Haizhudistrikto, ofte vizitas balon. 70-jara s-ro Guo ŝerce diris, ke lia edzino antaŭe estis tre dika kaj nun sveltas, dank' al la persisto en dancado dum la pasintaj jaroj. Multaj maljunuloj trovis, ke dancado ankaŭ povas kuraci kronikajn malsanojn.

KURACI INTERNAJN MALSANOJN SURHAŬTE

Laŭ la ĉin-medicina teorio oni nomas la malsanojn de internaĵoj internaj malsanoj kaj la malsanojn de haŭto kaj aliaj korpopartoj eksteraj malsanoj.

Ĉin-medicinaj kuracistoj kuracas internajn malsanojn per gluo, ŝmiro, lavo, fumkareso ktp. Tio estas kuraci internajn malsanojn surhaŭte kaj enskribiĝas kiel tradicia terapio de la ĉina medicino. Troveblas multaj notoj pri ili en antikvaj ĉinaj medicinaj libroj.

Kial oni povas kuraci internajn malsanojn surhaŭte? Fakte, laŭ la ĉin-medicina teorio la interna kuraco kaj surhaŭta kuraco diferencas inter si nur per malsamaj metodoj uzi medikamenton. Ĝenerale, por la interna kuraco, medikamento unue eniras la stomakon kaj poste ĝiaj substancoj estas digestitaj kaj portitaj al la tuta korpo. La rekremento de la medikamento estas nedigestebla kaj ne povas eniri ĝingluojn, kielodoro de la medikamento. Oni metas medikamenton sur haŭton aŭ tenas ĝin proksime al la haŭto, por ke laodoro de la medikamento trapenetru la haŭton kaj bone efiku sur ĝingluojn. La ĉina medicino opinias, ke ĉiuj partoj de la korpo estas interligitaj unu kun alia per ĝingluoj kaj formas unu tuton. Tial, povas esti, ke la interna malsano montriĝas surhaŭte kaj haŭta malsano influas internan organon. Por kuraci internan malsanon oni metas medikamenton sur akupunkturajn punktojn, kiu donas efikon per ĝingluoj.

Nun pli multe da pacientoj volonte ricevas kuracilon per drogaj sako, kapkuseno kaj kuseno. Ili bone efikas sur la korpo pere de alkoholo, fenolo, aldehido, ketono kaj estero de drogoj, kiuj trapenetras la haŭton.

Kuraci internajn malsanojn surhaŭte estas tradicia terapio de Ĉinio. Nun oni kombinas modernajn teknikojn, kiaj sono, lumo, elektro kaj magneto, kun la terapio, por ke ĝi efiku pli bone. Pro tio modernaj teknikoj nepre renovigos la antikvan terapion.

Vizito al lando de marmoro

Teksto de **HU YUN**

Fotoj de **LIU SIGONG**

EN urbo Dali de Yunnan-provinco mi vidis nemalmultajn butikojn de marmoraĵoj. En vespero multaj etvendistoj ofertis sur stratoj diversajn marmorajn florzvojn, plumujojn, cindrujojn, ŝakskatolojn, sanigajn pilkojn, testudojn, pagodojn kaj aliajn metiartaĵojn.

Mi iris inter butikoj kaj standoj kaj estis allogita de delikata plumujo. Ĝi estas en simpla formo kaj zorge polurita, blanketaj strioj kontrastis kun griza fono. Sed tiu plumujo en alto malpli granda ol plumo estas tre peza en mia mano. Pro longa distanco de Yunnan al Pekino, mi kontraŭvole forlasis la intencon aĉeti ĝin. Sed antaŭ forlaso de Dali, mi ne povis rezisti allogon de marmoraĵoj kaj aĉetis du marmorajn testudojn kaj unu inkfrotujon. Malgraŭ tio mi bedaŭris. Mi pensis, ke multaj homoj, kiuj vizitis Dali, havis tian bedaŭron same kiel mi.

Sed kompare kun ili mi estis feliĉa, ke mi vizitis la vilaĝon, kiun oni nomas lando de marmoro. Marmoraĵoj vendataj sur la stratoj de Dali ja estis faritaj de metiistoj de la vilaĝo.

Dali kun longa historio estas fama kultura urbo en la sudokcidenta parto de Ĉinio. Nermalproksime de la urbo staras tri pagodoj konstruitaj en Tang-dinastio (618-907). Post ili staras Cangshan-monto kaj antaŭ ili etendiĝas la vasta lago Erhai, kiuj karakterizis la pejzaĝon de Dali. La tri pagodoj jam fariĝis signo de Dali. La lando de marmoro, Sanwenbi-vilaĝo, situas ĉe la tri pagodoj.

Sanwenbi vere meritas la nomon marmora vilaĝo, ke tie la vojoj estis pavimitaj per marmoraj pecetoj, la pordoj de domoj estis inkrustitaj per marmoraj platoj, kaj en multaj kortoj amasiĝis marmoraj pecoj. Vilaĝestro Li Ming konigis, ke ekspluatado de marmoro de Cangshan-monto estis komencita en Tang-dinastio kaj nun ĝi ankoraŭ estas ĉefa okupo de la vilaĝanoj krom agrikulturo. 120 el la 516 familioj de la vilaĝo prilaboras marmoraĵojn ekskluzive.

En malgranda laborejo de kamparano Yang Qingguo estis du ordinaraj torniloj. Li metis pecon da marmoro sur tornilon por smirgi ĝin. La tornilo bruegis kaj leviĝis polvo. Post nelonge glata kaj delikata tigoglaso estis elfarita. Yang Qingguo deme-

tis la buŝsirmilon kaj diris, ke li aĝas 36 jarojn, antaŭe li faris kamplaboron, antaŭ 6 jaroj li lernis teknikon en marmora fabriko de la vilaĝo, poste li aĉetis maŝinon kaj komencis fari marmoraĵojn, li faras ĉefe glasojn, florzvojn k.a., pro tio li enspezas pli ol 500 juanojn ĉiumonate.

La fabriko de Yang Wenxiang estas multe pli granda ol la malgranda laborejo de Yang Qingguo. Tiu privata fabriko havas 6 laboristojn kaj pli ol cent mil juanojn kiel kapitalon. En la korto stokiĝis multe da marmoraj platoj. Laboristo diris al mi, ke la fabriko prilaboras ĉefe marmorajn platojn por konstruado kaj meblofarado. En lia hejmo estas delikata meblaro kun inkrustaĵoj de marmoro. Alia laboristo diris al mi, ke en la vilaĝo estas aliaj 3 tiaj privataj fabrikoj, sed ilia skalo estas malpli granda ol tiu de Yang Wenxiang, sed la fabriko de la vilaĝo estas pli granda ol la lia.

La marmora fabriko de la vilaĝo estis fondita en la 60-aj jaroj, kaj tie nun estas 40 laboristoj. Kiam mi atingis la fabrikon, ĝi estis ripozanta pro manko de elektro. Tamen la marmoraj artaĵoj en la ekspozicio de la fabriko plezurigis miajn okulojn. Admirindaj estis la ekranoj kaj pladoj faritaj el kolora marmoro, kies vejnoj estis tre similaj al montaro, matenruĝo, luktantaj tigroj aŭ kantantaj orioloj. Laboranto de la fabriko diris, ke blanka marmoro kun koloraj vejnoj estas speciala minaĵo de Cangshan-monto kaj bona materialo por fari ekranon kaj mur-

Standoj de marmoraĵoj





Naturaj vejnoj de marmoro

bildon.


En la ekspozicio la vivovera ŝtona leono estis farita de maljuna metiisto Yang Chun. Li estas 70-jara, tamen liaj ostecaj manoj ankoraŭ estas fortaj. Laŭdire, kiam li estis dekkelkjara, li jam komencis prilabori marmoron, kaj nun li ne bezonas projekton dum gravurado de ajna besto. Oni diris, ke li ne scipovas pentri, kaj li ne bezonas pentri, ĉar figuroj de ĉiuj objektoj jam gravuriĝis en lia cerbo. Ankaŭ la 57-jara Yang Yizhong kaj 64-jara Zhong Yangyuan estas veteranaj metiistoj, kiuj ne lernis belarton, kaj bone mastras la teknikon en utiligo de diversaj vejnoj. Dank' al ilia tajlado kaj smirgado mirinda bildo aperis sur ordinara marmorpeco.

La produktaĵoj de la fabriko estas tre ŝatataj eksterlande. Antaŭ nelonge la fabriko eksportis al Tajlando paron da florvazoj altaj je unu metro. Iu profesoro de Pekino mendis pli ol cent pladojn por donaci al japanaj amikoj. Leginte la nomon sur la mendilo, mi trovis, ke la mendinto estis mia instruisto en universitato. Vidinte la ekspedotan keston da pladoj, mi pensis en mi, ke la instruisto vere estas pli saĝa ol la instruisto kaj ne bezonis bedaŭri kiel mi. ■




Maljuna artisto faranta marmorajon





Naturdotitaj vejnoj de marmoro

Naturdotitaj vejnoj de marmoro



Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Rusaj novgeedzoj serĉas ajnan laboron en Eŭropo (prefere: Svisio, Belgio, Nederlando). Ambaŭ ili scipovas Esperanton, iomete anglan, francan. USSR - 156008, Galina Sokolova, Shagova 187-9, Kostroma.

* Zaĥarov. Aleksej Petrovic dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: s. Kambulat, ul Komarova 8, Turkmenskij 2-n, Stavropoljskij kraj, SU-356510, USSR.

* Membroj de la Esperanto-Klubo dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj. Ĉiu skribinto nepre ricevos respondon. Adr.: Vladimir Bespalov, Poŝtkesto 913, 354000 Soĉi, USSR.

* Rein Reimo deziras interŝanĝi al-umetetikedojn, korespondas Esperante, angle, germane, estone. Adr.: SU-202600, Polva, Poste Restante, Estonio, USSR.

* Katja Dedjuhina, 14-j. knabino, dez. kor. kaj interesigas pri kalendarretoj, poŝtkartoj, Adr.: pr. Metalurgov 308-95, Krasnojarsk 660005, USSR.

* Kon Kil-jun, 25-j., dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj, interesigas pri historio. Adr.: 602-040, Koreio, Pusan-si, So-gu, Ĉoĵan-don, 75 (15/4).

* Stanislaw Fischer deziras korespondi kaj interŝanĝi filatelaĵojn. Adr.: Bulgarska 8/8, PL-64-100 Leszno, Pollando.

* Jana Reŝotna, 14-j. knabino, dez. kor., interesigas pri kalendarretoj, maĉgumetoj, bildkartoj, kaj animaloj. Adr.: ul. Lenina 28-146, Krasnojarsk 660049, USSR.

* Jurij Lunjov, 19-j. studento, dez. kor., interesigas pri poŝtkartoj kun pejzaĝoj de urboj, Adr.: ul. Samodejatelnosti 1-10, Krasnojarsk 660060, USSR.

Subtera Loĝejo

Teksto de LI QIANG

Fotoj de YOU JUAN kaj LI QIANG

SANMENXIA estas valo ĉe la meza parto de la Flava Rivero. La lokoj ambaŭflanke de la rivero estas unu el la luliloj de la ĉina nacio. La kultura ruino en la baseno sude de Yangshao-vilaĝo de Mianchi-gubernio estis restadejo de granda tribo en la malfrua periodo de la matriarka klana socio antaŭ 5 000-6 000 jaroj. Kaj Yangshao-kulturo estas ĉefa reprezentanto de la antikva ĉina kulturo en la baseno de la Flava Rivero.

La kelkmil-jara civilizacio postlasis en Sanmenxia sennombrajn historiajn restaĵojn. Mi estis feliĉa partopreni "Vojaĝo laŭ la Flava Rivero ĉe Sanmenxia". Mi vizitis Hangu-pasejon, strategie gravan lokon en la antikveco, Taichudomon, en kiu antikva ĉina filozofo Laozi verkis "Dao De Jing", kaj faman antikvan eĥan Baolunsi-pagodon, ĝuis la pejzaĝon de la Flava Rivero sidante en fiŝforma plezurŝipo kaj poste veturis per aŭto al Zhangjiawan-vilaĝo sude de la rivero.

La loĝantoj ambaŭflanke de la rivero havas kutimon de arboplan-tado. Se oni vidas prosperan arbaron en malproksimo kaj iras al ĝi, oni povas trovi vilaĝon. Sed en la arboriĉa Zhangjiawan-vilaĝo mi vidis neniun loĝdomon. Kie loĝas la vilaĝanoj?

La ĉiĉerono gvidis min al altaĵo kun unu-metre altaj muroj. De tie mi rigardis malsupren kaj vidis grandan korton kun areo de 100 kvadrataj metroj. Ĉirkaŭe estas kaverndomoj, en kiuj loĝas vilaĝanoj.

Starante ĉe muro mi rigardis ĉirkaŭen kaj vidis sur la tero nemalmultajn tiajn kvadratajn ĉirkaŭmurojn, sub kiuj estas familioj. La malaltaj muroj ŝirmas kontraŭ polvo, pluvo kaj diversaj malpuraĵoj kaj ne lasas ilin en la kortojn sub la tero. Tiaj originalaj loĝdomoj estas nomataj terkavaj kaverndomoj.

Por akomodigi al la tieaj geologiaj, topografiaj, klimataj kaj ekonomiaj kondiĉoj, la loĝantoj de la Leŭsa Altebenaĵo generacion post generacio loĝas en kaverndomoj. Tio devenis de la vivmaniero de la prahistoriaj kavernhomoj. La kaverndomoj havas plurajn formojn. Sur ebena altaĵo oni faris kvadratan aŭ rektangulan kavon je ĉ. dek metroj profundan kaj poste kavigis ĝiajn horizontalajn surfacojn por fari kaverndomojn. Tiel aperis tiaj kaverndomoj. Hodiaŭ ili jam fariĝis vidindaĵo por turistoj vojaĝantaj en la kamparo ambaŭflanke de la Flava Rivero kaj estas tre valoraj por esplori kaj studi la morojn kaj la evoluon de la kaverndoma arkitekturo sur la Leŭsa

Altebenajo.

Sude de la malaltaj muroj estas longa deklivo. Mi iris malsupren laŭ la deklivo al loko alta kiel la kavofundo. Tra pasejo-simila aper-turo mi eniris en vastan korton.

Vidinte min, la mastro eliris por bonvenigi min. Ĉe la norda flanko de la kavo troviĝas tri kaverndomoj, kiuj estas ĉefa loĝejo. Mi sekvis la mastron en unu el ili. La domo estas granda kaj bone prilumata.

La mastro nomiĝas Zhao. Lia familio havas naŭ membrojn de kvar generacioj. Lia maljuna patri-no loĝas en unu kaverndomo, li, liaj edzino kaj juna filo en la dua, liaj du filinoj en la tria, kaj liaj plej aĝa filino, bofilo kaj nepo en la kvara. Mi vizitis la kaverndomon de iliaj filinoj, la plej puran kaj belan el la kvar. Ĝiaj muroj kaj volbo estas glate stukitaj kaj la muroj tapetitaj per blankaj paperoj kun novjaraj bildoj. Sur la muro, ĉe la lito, pendas eleganta blanka tolo. Ĉe la kontraŭa muro staras kompleto da ŝrankoj. En la domo troviĝas ankaŭ seĝoj kaj tabloj por la lernado kaj tualetoj de la filinoj. La domo kun malmultaj mebloj impresas tamen bonorde kaj komforte. La knabinoj jam finis la studadon en mezlernejo kaj nun okupiĝas pri agrikulturo.

La orienta kaverndomo servas kiel kuirejo, kie estas kaldronoj, forno kaj fajroblovilo uzitaj de pluraj generacioj kaj krome ankaŭ moderna gasforno. La mastro diris, ke ili uzas gasbotelon kaj, eluzinte la gason, ili devas veturi malproksimen por plenigi la botelon, tial ili uzas la gasforon nur en aferoplena sezono kaj ordinare la malnovtipan fornon kun brulligno kaj karbo kiel hejtaĵo. Mi vidis en la kuirejo, ke la virinoj estas lertaj en preparado de farunaĵo. La de ili preparitaj panoj estis tre grandaj. Mi pensis, ke ili ne povas esti sufiĉe vaporumitaj. Mi duigis unu el ili, manĝis ĝin kaj trovis, ke ĝi estas mola kaj bongusta.

La sudaj kaverndomoj, sensunaj kaj malhelaj, estas destinitaj por teni diversajn malofte uzatajn objektojn. En aliaj du malgrandaj kaverndomoj estas bredataj porkoj kaj kokoj, kiuj ofte iras en la korton kaj malpurigas ĝin. La higiena problemo eble estas la plej grava por tiaj kaverndomoj.

Nordokcidente de la korto estas gren-tenejo. Ĝi diferencas de la aliaj per luko rigardanta supren al la tero, sur kiu estas draŝejo. En la rikolta sezono oni sunumas tritikon kaj sojfabojn sur la draŝejo. Post kiam ili sekigiĝas, oni enportas ilin en la grentenejon tra la luko.

Oni konstruis tegmenton super la luko por ŝirmi ĝin kontraŭ pluvo kaj polvo.

Je mencio pri pluvo mi tuj ekpensis, ke ĝi povus inundi la korton. La mastro diris al mi, ke sub la korto estas pluvujo je dekelkaj metroj profunda. Ĝi estas grandega, kaj neplenigebla pro rapida tralaso de akvo. La pluvujo surhavas kovrilon kun granda tavolo da tero sur si. Ĝi estas nerimarkebla. Sub la rando de ronda cementa plato videblas kvadrata truo, tra kiu malpura akvo fluas en la pluvujon. Tio estas antikva instalaĵo por defluigi akvon.

La familio uzas putakvon. La puto estas profunda kaj malproksima de la pluvujo kaj ĉi tiu ne povas ĝin polucii.


Konstruado de tia kaverndomo ŝparas fortojn, materialojn kaj terspacon kaj ne detruas flaŭron, kaj tia domo estas varma en vintro kaj malvarmeta en somero. La mastro diris, ke la temperaturo de lia domo tutjare estas inter 10°C-20°C. En la domo oni sentas malvarmeton en varma somero. Kaj en someraj noktoj oni bezonas eĉ vatican litkovrilon. Sed en vintro estas varmete en la domo kaj frosta vento ne povas penetri.

En la korto kreskas arboj, floroj kaj herboj, kiuj aldonis vivecon al la korto. Malofte okazas, ke la loĝantoj suferas artriton, reŭmatismen kaj trakeiton. Oni diris, ke tie la tero estas salubra.

Kvankam tiaj kaverndomoj havas multajn avantaĝojn, tamen kun disvolviĝo de la produktado kaj progreso de la socio iuj loĝantoj de Zhangjiawan-vilaĝo eliris el sia kaverndomo kaj konstruis etaĝdomon en alia loko, ke iuj tiaj kaverndomoj estis forlasitaj. Tamen kun la prosperiĝo de la turisma afero en la lastaj jaroj la kaverndomoj vekis intereson kaj atenton de multaj ĉinaj kaj alilandaj turistoj kaj arkitektoj. La turisma servo de la urbo Sanmenxia jam starigis tie hotelojn el kaverndomoj kaj koniĝas al la turistoj la vivon en kaverndomoj. ■

Kuirejo kun gasforno






Kaverndomoj sub la tersurfaco

En kaverndomo




Dommastrino





Korto sub la tersurfaco

Irejo kondukanta al kaverndomo





Guo Shifu en pentrado

LI QIANG:

Li amas pentri florojn kaj birdojn

LA pentraĵoj de Guo Shifu, precipe liaj lerte faritaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj, profunde impresas min. La ruĝaj umefloroj fiere disvolviĝantaj en neĝo, verdaj bambuoj balanciĝantaj en zefiro post pluvo, konvolvuloj forte kreskantaj ĉe la heĝo de kamparana korto, agloj, hirundoj kaj akvobirdoj ĉiuj ĉarmas la rigardantojn.

Liaj pentraĵoj plaĉas al mi, kaj iun someran vesperon mi vizitis lin en ordinara domo en la suda parto de Pekino. Gastama, li sidigis min, lia edzino alportis trinkaĵon kaj akvomelonon kaj ni babilis manĝante la melonon.

Guo Shifu estas 46-jara, samaĝa kiel mi. Tial, tuj post nia konatiĝo ni interparolis, kiel malnovaj amikoj, kvankam ni havas malsamajn travivaĵojn.

Mi diris al li, kiel mi finis la lernadon en elementa, mezgrada kaj supera lernejoj kaj kiel mi okupiĝas nun pri redaktado, kaj

li rakontis al mi siajn travivaĵojn. Li studis en lernejo ne longe. Li lernis pentradon ĉefe en sia artista familio, kies pluraj generacioj vivis de arto. Precipe lia patrin-flanka avino estis sufiĉe lerta en pentrado de floroj kaj birdoj kaj multe influis lin.

Kiam Guo Shifu estis 6-jara, la familio sendis lin studi pekinan operon. Kvankam poste li profesias ne kiel aktoro de pekina opero, tamen li bone scias la arton de tiu opero kaj nun ankoraŭ povas iom kanti ĝin. Oni diris, ke lia kantado estas bela. Jam de la infaneco li ŝatas pentradon. En lia 6-16-jara aĝo la avino instruis al li kaligrafadon kaj pentradon. Ŝia severa kaj pacienca instruado metis solidan bazon por lia pentra tekniko.


En sia 16-jara aĝo Guo Shifu ekokupiĝis pri sceneja belarto. Poste, dum multaj jaroj li studis la eŭropan pentrarton. Post kiam li fariĝis profesia pentristo de la Pekina Pentra Societo, li dediĉis 10 jarojn al la liberlinia tuĉpentrado de floroj kaj birdoj. Dume li sidis super studo pri teorioj de eminentaj ĉinaj pentristoj antikvaj kaj nuntempaj kaj lernis iliajn fortajn punktojn. Dank' al lia diligenta lernado, iom post iom perfektigis lia tekniko kaj formiĝis lia propra stilo.

Liaj liberliniaj tuĉpentraĵoj

pri floroj kaj birdoj estas laŭdataj de multaj ĉinaj pentristoj, tial li estis elektita kiel vicĉefsekretario de la Pekina Instituto pri Floraj kaj Birdaj Pentraĵoj. De tiam li pli amas pentri florojn kaj birdojn. Sur ĉiuj muroj de lia laborejo pendas liaj prifierindaj verkoj. Ĉio sub lia peniko — verda pino, sovaĝa orkideo, granda roko kaj fluganta birdo — fariĝis elvokiva.

Guo Shifu montris al mi multe da pentraĵoj. Mi admiris ilin kaj demandis lin, kio estas la plej grava por fari pentraĵon. Anstataŭ respondi la demandon, li klarigis al mi, ke pentristo, kiel vera artisto, ne devas scii nur pentri. Tiu, kiu scias nur pentri, ne estas pli ol pentranto. Artisto devas esti, antaŭ ĉio, multescia. Li devas koni la homan vivon, koni la socion kaj havi altan klercon.

Tial, kiel pentristo, Guo Shifu neniam enfermas sin en sia laborejo. Li ofte vojaĝas tra la lando por ĝui ĝiajn pejzaĝojn kaj serĉi inspirojn en la naturo. Li koncentras sian amon al la naturo sur la penikon. Li amas la vivon kaj la naturon, akre observas ĉion ĉirkaŭe, antaŭ ol ĝin esprimi kun granda fervoro. Eble en tio kuŝas la kaŭzo, kial liaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj estas vivoplenaj kaj tiuj pri pejza-



“Kamelio”, pentraĵo farita de Guo Shifu


ĝoj imponaj.

Guo Shifu estas lerta ne nur en pentrado, sed ankaŭ en kaligrafado. En lia laborejo mi vidis lian kaligrafiaĵon kun 8 ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj “Forteco en stilo, la plej grava por kaligrafado”. La “forteco en stilo” ja


montras lian karakteron en pentrado. Tamen, kiam iuj pentristoj emis al snobeco, ekscito kaj mistiko, li sekvis “rulinon”, restis ankoraŭ serioza en pentrado kaj iris sian propran vojon.

Kiam mi konigis al li la revuon “El Popola Ĉinio”, li ĝoje

esprimis, ke li volonte amikiĝos kun esperantistoj, kaj petis min transdoni al esperantistoj lian novan pentraĵon pri kamelio. La redakcio de EPC jam decidis donaci la valoran pentraĵon al tiu, kiu gajnos en la dua konkurso de EPC-legado. ■



Brokita litkovrilo




Brokita murornamaĵo


Brokaĵoj

Fotoj de XIN KEJING

Brokaĵoj de tuĝa-oj estas unu el la tradiciaj popularaj metiartaĵoj de Ĉinio. Ili estas faritaj el lano, kotono aŭ lino per ligna teksilo. Luj desegnoj de la brokaĵoj estas faritaj laŭ legendoj, historiaj rakontoj kaj dancmovoj, kaj aliaj figuras birdojn, bestojn, florojn kaj pejzaĝojn. La brokaĵoj karakteriziĝas per delikateco, ĉarmo kaj kontrasto de koloroj. Estas centoj da specoj de la brokaĵoj. Krom brokitaj vestoj, litkovriloj kaj pasamentoj kun tradiciaj desegnoj, estas ankaŭ brokitaj modernaj vestoj, murornamaĵoj, turismaj sakoj kaj kravatoj en nacia gusto.



Brokita sidkuseno



Brokita vešto

de tuĝia-oi

Tuĝja-a knabino en brokado



Raraj birdoj

Birdoj estas tre ŝatataj. Multaj ĉinaj poŝtmarkoj prenas rarajn birdojn kiel siajn desegnojn. La 3-peca poŝtmarkoserio (en la dua vico) kun desegno de ruĝa ibiso estis emisiita la 15-an de majo 1984; la 2-peca poŝtmarkoserio (en la unua vico) kun desegno de krosoptilono (*Crossoptilon mantchuricum*) estis emisiita la 21-an de februaro 1989; la 4-peca poŝtmarkoserio (en la tria vico) kun desegno de cigno estis emisiita la 18-an de novembro 1983; kaj la 4-peca poŝtmarkoserio (en la kvara vico) kun desegno de aglo, tigrokapa haliaeto, vulturo kaj buteo estis emisiita la 20-an de marto 1987.

